

# EL POPOLA ĈINIO

Marto 1969

# Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong

En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj—la plej fidinda aliancano de la laborista klaso.



Prezidanto Maŭ intime parolas kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum sia vizito al iliaj familioj.

# Elementa Lernejo Administrata de Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj

En la montregiono de suda Liaŭning-provinco troviĝas elementa lernejo nomata "Pino", kiun establis la loka popolo kaj administras malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. De kelkaj jaroj, sub la rekta administrado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝi sane kreskas laŭ la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ.

La elementa lernejo "Pino" troviĝas en la brigado "Pino" de Gianji-komunumo. La 231 familioj de tiu brigado loĝas tre dise en du ravinoj, kvin ravinbranĉoj kaj sur du riverbordoj. En la malnova socio, la gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne havis ŝancon viziti lernejon. Post la Liberiĝo, ankoraŭ multe da infanoj, kiuj atingis la aĝon por eklerno, ne povis viziti lernejon kaŭze de la reviziisma eduka linio.

En la jaro 1964, la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio venis al la brigado "Pino". La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis tre ĝojigitaj kaj kuraĝigitaj kaj tuj establis per siaj propraj fortoj la nomitan lernejon administratan de si mem.

Ĉar la lernejo firme sekvas la direkton montritan de Prezidanto Maŭ, ke eduko devas servi al la politiko de la proletaro kaj al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj strikte kombiniĝi kun la produkta laboro, la lernejo fariĝas ĉiam pli bona kaj pli prospera.

La lernantoj de la elementa lernejo "Pino" lernas kaj laboras po duontago. Ili lernas pli multe en la tempo kiam agrikulturaj laboroj malmultas, kaj pli multe laboras en laborplena sezono. La tutan elspezon de la lernejo kovras la laborenspezoj de la instruistoj kaj lernantoj. La foto montras ĝiajn instruistojn kaj lernantojn revenantajn post lignaĵ-kolektado sur monto.





Strikta kombiniĝo de instruado kun produkta laboro.



La maljuna malriĉkamparano Li Venŝeng, membro de la komitato de eduka revolucio, rakontas al lernantoj sian komprenaĵon en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.




Pro tio ke la lernantoj loĝas tre dise, la instruistoj iras al hejmo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por doni lecionojn. Jen iu instruisto donas lecionon al lernantoj sur masonita lito en hejmo de iu komunumano.




La instruistoj kaj lernantoj kritikas la reviziisman edukan linion kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

ĴEN HONG:

# Lernejoj de Nova Tipo Elkulturas Novajn Homojn

*En la ĝojplenaj tagoj, kiam la plur-centmiliona revolucia popolo de nia lando celebris la plenan ruĝiĝon de la lando, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis instrukcion:* **"En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso."** *Nun jam rapide leviĝis ardanta movado de eduka revolucio en la vasta kamparo de nia lando. La centro de tiu ĉi eduka revolucio vaste disvolviĝanta en nia kamparo estas solvi la problemojn, kiu tenu la potencon de eduko en la kamparo kaj kiajn daŭrigantojn oni elkulturu.*

*Frue jam en 1927, en* Raporto pri Esplorado de la Kamparana Movado en Hunan *kamarado Maŭ Zedong jam konfirmis la rolon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en disvolvado de kulturo kaj eduko en la kamparo. Kaj en la socialisma periodo, li multfoje montris, ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj devas administri la kamparajn lernejojn. Sed la granda renegato Liu Ŝaŭki ĉiamaniere oponis la orientilon kaj linion de Prezidanto Maŭ administri lernejojn per sinapogo sur malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj puŝis iujn kamparanajn lernejojn sur la relojn de sia reviziisma linio de lerneja administrado.*

*En tiu ĉi numero ni iom koncentre prezentas al niaj legantoj la staton de la eduka revolucio kaj la jam atingitajn sukcesojn en nia kamparo. El tio la legantoj ĝenerale komprenos, kial ni disvolvas tiun ĉi edukan revolucion en nia kamparo, kial en la kamparo la lernejoj nepre devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj kia nova atmosfero aperis, post kiam la eduka potenco en la kamparaj lernejoj estas alprenita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*

**— La Red.**

La eduka revolucio en la lernejoj de Ŝujjuan-komunumo, Jingkoŭ-gubernio, Liaŭning-provinco akiris relative elstarajn atingojn. La revolucia komitato de la komunumo kaj la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de la Liberiga Armeo serioze studis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri la eduka revolucio, resumis la lecionon el la eduka reformo apartigita disde la aktuala vivo, disde la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sen konduko de revolucio en la fundamenta sistemo ktp. Ili iris el la lernejoj kaj profundiĝis en la amasojn, kombiniĝis kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, prenis ilin kiel instruistojn kaj vaste disvolvis la amasan movadon de eduka revolucio.

## MALBONA REZULTO DE LA REVIZIISMA EDUKA LINIO

Sub la gvido de la komunuma revolucia komitato kaj la helpo de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de la Liberiga Armeo, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de Ŝujjuan-komunumo iris el la lernejoj kaj levis kune kun la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la amasan movadon entuziasme studi kaj apliki la penson de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio kaj plene kritiki kaj frakasi la reviziisman edukan linion de la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.



*La instruistoj de la lernejo "La 1-a de Aŭgusto" de Ŝujjuan-komunumo organizis surkampan studrondon kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por kune studi verkojn de Prezidanto Maŭ.*

En la fundamentaj problemoj por kiuj funkciu la lernejoj, kiajn homojn oni eduku, sur kiuj oni apogu sin en funkciigo de lernejoj, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj akuzis el siaj propraj spertoj la malnovan edukan sistemon. Ili montris: La reviziisma eduka linio starigis obstaklojn post obstakloj kontraŭ la gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiaj enira ekzameno, klasripeto, ĉesigo de lernado, enira ekzameno por plialta lernejo. Kaj krome, la lernejoj dislokiĝas malracie, tiel ke gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne povis viziti pli altan lernejon ĉe proksima loko. Komunumano-malriĉkamparano de la brigado "La l-a de Aŭgusto" diris: "La 29 familioj de nia brigado havas tri abiturientojn, inter kiuj nur unu estas el niaj 28 familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sed la aliaj du estas el la kulaka kaj kapitalista familioj. Por kiuj do funkcias la lernejoj?" Multaj gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj devas helpi siajn gepatrojn labori post lecionoj, tial la notoj ricevitaj de ili en lernado estas kompare malbonaj. En iu grupo de Kjunli-lernejo lernis komence 38 lernantoj, sed kiam la grupo atingis la sesan klason, 33 lernantoj, ĉiuj el la familioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj jam estis devigitaj ripeti klason aŭ ĉesigi sian lernadon. Nur 5 lernantoj finis la lernadon.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj montris, ke la lernejoj antaŭe metis la "mensan edukon" kaj "notojn" en la unuan lokon, selektis ne laŭ klasdeveno, sed laŭ notoj. Pro tio multaj lernantoj klopodas nur por akiri notojn en la lernejo kaj laborpoentojn en la produkta brigado. Al ili en la kapo regas nur "notoj, notoj kaj ankoraŭ notoj", dum la revolucio estas forĵetita dorsen.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj akre kritikis: Multaj lernantoj elkulturitaj de malnovaj lernejoj aspiras nur al laboro en la urbo, sed ne en la kamparo. La lernolibroj tute ne elstarigas la penson de Maŭ Zedong, sed entenis multe da nigraj varoj feŭdaj, kapitalismaj kaj reviziismaj. Eĉ troviĝis tekstoj pri tio ke Liu Ŝaŭki "estis plena de kuraĝo" en la Anjuan-a batalo, kaj ke oni "kreskigu ĉirkaŭ domoj aŭ fabojn aŭ kukurbojn". Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj indigne diris: "Tio estas nigra varo de 'tri pliigoj kaj unu fikso' de Liu Ŝaŭki, kiun ni delonge jam senkreditigis per kritikado; do pro kio ankoraŭ legi tian libron!" Kaŭze de tio ke en la lernejoj oni donis tiajn instruojn, ankaŭ la kapo de multaj lernantoj estas plena de egoismo kaj malestimo al laboristoj kaj kamparanoj. En la supre menciita brigado estas diplomito el malsupera mezlernejo. Kiam li revenis al la kamparo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis lin libro-


tenisto, sed li diris: "Mi jam lernis 8-9 jarojn. Tamen nur por fari tion?" Komparante la lernejojn kun la Liberiga Armeo, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: "La Liberiga Armeo estas vera granda lernejo de la penso de Maŭ Zedong, kiu elkulturis en mallonga tempo multajn heroojn kiaj Lej Feng, Vang Gie, Liu Jinggjun, Li Venĝong kaj Men He. Sed la lernejoj, de elementaj lernejoj ĝis universitatoj, per pli ol 16 jaroj, elkulturis en granda nombro nur tiajn intelektulojn, kiuj malestimas laboristojn kaj kamparanojn, apartiĝas disde la praktiko kaj ne elstarigas la politikon de la proletaro.

La faktoj pruvas, ke malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj havas plej profundan klasan amon al Prezidanto Maŭ, plej profundan konon pri la venena influo de la reviziisma eduka linio kaj plej multe havas la rajton de parolo en kritiko kontraŭ la malnova eduka sistemo. Interŝanĝante siajn komprenojn la instruistoj kaj lernantoj de la lernejoj de Ŝujjuan-komunumo diris: "La direkto estas al ni montrita de Prezidanto Maŭ, la okulojn akrigis al ni la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."

## ADMINISTRI LERNEJOJN PERE DE MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ

La fundamenta problemo de la eduka revolucio estas tio, kiuj direktas en la lernejoj. Prezidanto Maŭ montris: **"En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso."** Ĉu la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tenu la potencon de eduko? Pri la graveco de tiu ĉi problemo, la revolucia komitato de Ŝujjuan-komunumo ne havis sufiĉan komprenon en la komenco. Poste, dank' al studo de la instrukcio de la 7-a de Majo de Prezidanto Maŭ kaj koncernaj dokumentoj, la komitato ekkomprenis, ke se la laboristoj kaj kamparanoj ne prenos al si la potencon de eduko, la domino de la burĝaraj intelektuloj super la lernejoj ne likvidiĝos. En la kamparo, fidindaj daŭrigantoj servantaj al la proletaro povas esti elkulturitaj nur post kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rekte administras la lernejojn.

*La revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de ĉiuj lernejoj de Ŝujjuan-komunumo eliras el la lernejoj kaj laboras sur kampoj kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili lernas dum laborado kaj ŝanĝis la fenomenon de eduko apartigita de la politiko de la proletaro, de la laboristoj kaj kamparanoj kaj de produkta praktiko.*



Post ripetada diskuto kaj enketo pri la opinioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la revolucia komitato de la komunumo decidis aboli la malnovan sistemon de unudirektora respondeco kaj fondi en la lernejoj komitaton de eduka revolucio konsistantan el reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kaj membroj de la brigada revolucia komitato.

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ "**la lernotempo devas esti mallongigita**", la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de Ŝujjuan-komunumo reduktis la lernotempon en elementa lernejo de 6 jaroj al 5, kaj tiun en mezlernejo de 6 (el du etapoj: 3+3) jaroj al 4 (el du etapoj: 2+2). Disvolvante la spiriton de ŝparema funkciigo de lernejoj, ili establis 20 lernejojn kvinjarajn, sepjarajn kaj naŭjarajn sub la kondiĉoj sen pliigo de personaro, de ekipaĵoj kaj de financa ŝarĝo al la amasoj, kaj tiel atingis ĝenerale ke ĉiu produkta grupo havas lernejon, ke la lernantoj ne bezonas eliri el la brigado por viziti malsuperan mezlernejon nek el la komunumo por viziti superan mezlernejon. Ĉiuj lernantoj loĝas hejme, tiel ke la lernejoj ne bezonas multajn ĉambrojn kaj ankaŭ la lernaj kostoj estas elporteblaj por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Post naŭjara lernado en elementa kaj meza lernejoj, 6-7-jaraj infanoj fariĝas nur 15-16-jaraj kaj ĝuste estas konvena tempo por partopreni agrikulturan laboron. Post kelkjara laboro, haviginte al si praktikan sperton, iuj el ili povas esti selektitaj en universtitatojn. Tia lernosistemo pli konformas al la reala stato en la kamparo, estas utila por eduka ĝeneraligo kaj bonvenigata de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

## TUTE NOVA ŜANĜIĜO

Ĉe la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de Ŝujjuan-komunumo, kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong jam fariĝis moro. Plene aplikiĝis en la komunumo la nova lernosistemo, ĉiuj infanoj nun vizitas lernejon kaj ankaŭ la lernantoj, kiuj antaŭe estis devigitaj forlasi lernejon, denove komencis viziti lernejon. La tuta komunumo pliigis sume 26 lernogrupojn kun pli ol 1,100 lernantoj.

Kiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vere tenas la edukan potencon, ili ŝanĝis sian opinion pri la lernejoj. Antaŭe la lernejoj traktis la produktajn brigadojn jene: "Ni instruas en nia maniero, kaj vi terkulturu sur viaj kampoj." Parolante pri la lernejoj, la malriĉ-



*La komitatoj de eduka revolucio de ĉiuj lernejoj de Ŝujjuan-komunumo studas la problemojn pri batalo, kritiko kaj reformo en lernejoj sub la helpo de la propagandaj taĉmentoj de ĈPLA.*

*Instruistinoj de Vengelernejo vizitas la hejmon de lernanto por kolekti opiniojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*



kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ofte diris: "Via lernejo aŭ ilia lernejo . . ." Nun la rilatoj inter la lernejoj kaj brigadoj, inter la instruistoj kaj la komunumanoj radikale ŝanĝiĝis. Aplikante la metodon "eliri kaj envenigi", la instruistoj kaj lernantoj unuflanke eliras el la lernejo por partopreni la tri grandajn revoluciajn movadojn, propagandi la penson de Maŭ Zedong kaj fari socian enketon, kaj aliflanke ili invitas al la lernejo malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn, kiuj multe suferis amarojn en la malnova socio kaj profunde malamas ĝin, por rakonti familiajn kaj vilaĝajn historiojn por kune rememori la pasintan amaron kontraste kun la nuna dolĉo. Ili ankaŭ invitas la estron de sekureco kaj defendo de la brigado doni lecionojn pri klasbatalo, la milican rotestron doni lecionojn pri militaj aferoj kaj veteranajn kamparanojn kaj agrikulturajn teknikistojn doni lecionojn pri produkta tekniko. Multaj komunumanoj nun komprenas, ke instruo de infanoj estas afero ne nur de la lernejo, sed ankaŭ de la familio, kaj ke oni devas eduki la infanojn kontraŭ reviziismo. Tiel kombiniĝis la lerneja eduko, la familia eduko kaj la socia eduko.

Dank' al la grandpaŝa revoluciigo de ideologio de instruistoj, multe ŝanĝiĝis ankaŭ la rilato inter la instruistoj kaj la lernantoj. Multaj instruistoj ekkomprenis, ke ili mem devas porti la ĉefan respondecon en la antaŭa malboniĝo de la rilato inter la instruistoj kaj lernantoj, ĉar ili malĝuste traktis la revolucian, ribelan spiriton de junaj revoluciuloj, kaj ke tio ne estas problemo de metodo, sed tiu de baza sinteno. Tial ili meminiciate faris memkritikon antaŭ la lernantoj, batalis kontraŭ egoismo kaj kritikis reviziismon, proksimiĝis al kaj kombiniĝis kun la lernantoj, kune studante, kune partoprenante la amasan kritikon, fizikan laboron kaj gimnastikan ekzercadon kaj kune amuziĝante. Tiel, ankaŭ petolaj knaboj memkritikis siajn mankojn kaj erarojn. Stariĝis nova rilato inter la instruistoj kaj la lernantoj. Instruistoj instruas lernantojn, lernantoj instruas instruistojn, lernantoj instruas sin reciproke, ĉiuj interhelpas kaj kune progresas en instruado kaj lernado. En la lernejoj aperis tute nova vivplena situacio.

# Maljuna Malriĉkamparano Fondis Agronomian Mezlernejon

VEJ HJUENONG

EN la kamparo de Nong-an-gubernio de nia Gilin-provinco cirkulas rakontoj pri la fondo de agronomia mezlernejo fare de maljuna malriĉkamparano kamarado Vang Hing, sekretario de la partia filio de Tajpingling-brigado.

En 1964, kamarado Vang Hing fondis agronomian mezlernejon administratan de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, sub kuraĝigo de la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ pri kulturo de daŭrigantoj de la proletara revolucia afero.

Por konigi al vi la procezon de starigo de tiu ĉi agronomia mezlernejo fare de kamarado Vang Hing, ni devas rakonti de la komenco.

## FONDI LERNEJON POR LA MALRIĈKAMPARANOJ KAJ MALSUPERAJ MEZKAMPARANOJ

En 1962, la eduka departemento de Nong-an-gubernio volis starigi mezlernejon en Gaŭgiadian-komunumo. Tion aŭdinte Vang Hing kaj aliaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre ĝojis. Ili meminiciate helpis la konstruadon de la lerneja domaro per homfortoj kaj veturiloj en transportado de brikoj kaj masonado de muroj, plene esperante ke estos facile por la gefiloj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj daŭrigi sian lernadon, kiam tiu mezlernejo estos fondita en proksimeco. Sed neatendite kaj kontraŭe al ilia deziro, de sia ekfunkcio tiu lernejo jam starigis diversajn barojn kiaj limigo per aĝo, enira ekzameno, lernpago kaj klas-ripeto por teni la gefilojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekster la lernejo. Tion vidinte, Vang Hing tre indignis kaj pensis en si: "Tiu ĉi mezlernejo ne estas fondita por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj."

Iutage, Vang Hing vizitis la hejmon de la maljuna malriĉkamparano Ju Ĉanggiu. Enirinte la domon, li rimarkis, ke Gujkin, la filino de la lasta mute sidas ĉagrene sur la hejtlito. Vang Hing ŝin demandis zorgeme: "Gujkin, vi jam finis la lernadon en supera elementa lernejo, ĉu vi ne sukcesis trapasi la eniran ekzamenon de la mezlernejo?" Tion aŭdinte, Gujkin tuj eklarmis. Tiam Ju Ĉanggiu diris kun sopiro kaj ĝemo: "Ne sukcesis! De generacioj niaj familianoj servis kiel bovoj kaj ĉevaloj al bienuloj kaj ne povis lerni en lernejo. Nun post la Liberiĝo mi deziras ke la infano lernu en lernejo, sed kiu atendis, ke trapasi la eniran ekzamenon de mezlernejo estas pli malfacile ol fariĝi *ĝŭangjuan-o* (titolo por la plej-antaŭa sukcesinto en la ĉina feŭda kortega ekzameno). Kia malesperigo!" La vortoj de Ju Ĉanggiu vekis la memoron de Vang Hing pri pasintaĵo: En la brigado sintrovas kulako nomata Huang Ven de 9-membra familio kun 7 gefiloj, inter kiuj ĉiuj lernaĝuloj lernas en lernejo, nome unu en universitato, unu en mezlernejo kaj du en elementa

*Vang Hing, la sekretario de la partia filio de Tajpingling-brigado kaj maljuna malriĉkamparano (la tria de dekstre) pridiskutas kun membroj de la komitato de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por administrado de lernejo la problemon kiel administri lernejon laŭ la eduka linio de Prezidanto Maŭ.*



lernejo; sed ankaŭ malriĉkamparano Huang Ĉeng havas 9-membran familion kun 7 gefiloj, el kiuj tamen nur la plejaĝa vizitis lernejon por 4 jaroj. En la brigado estas 3 studentoj, inter kiuj du estas el bienul-kulakaj familioj kaj la tria el familio de riĉhava mezkamparano, sed neniu el familio de malriĉkamparano aŭ malsupera mezkamparano. Vang Hing pensis: Hodiaŭ, mezlernejon ne povas eniri ne nur la filino de Ju Ĉanggiu, sed ankaŭ multaj aliaj gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Kial multaj el la gefiloj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne povas lerni kaj nur malmultaj el ili povas trapasi eniran ekzamenon de pli altgradaj lernejoj? Kial post starigo de la mezlernejo en proksimo, la gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ankoraŭ estas tenataj ekster ĝia pordo?

Kaj tiam Vang Hing firme decidis fondi agronomian mezlernejon tute konforman al la deziro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri esplorado kaj enketado, li plurfoje vizitis revoluciajn instruistojn kaj lernantojn en guberniaj mezlernejoj, pristudis la malutilojn de regado fare de malnovaj intelektuloj en lernejo al la proletara revolucia afero kaj al la juna generacio, kaj li ofte vizitis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn por scii iliajn dezirojn kaj postulojn pri starigo de lernejo. Informiĝinte, ke Vang Hing fondos agronomian mezlernejon, tre ĝojis la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili diris al Vang Hing kun arda volo: "Se ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj mem starigos lernejon, ĝi povos elkulturi daŭrigantojn de nia afero. Entreprenu, Vang Hing, por sukceso ni ĉiuj prenos sur nin ĉian ajn kolosan malfacilon.

La deziro kaj aktiva subteno de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj plifirmigis la fidon de Vang Hing en starigo de lernejo. Do li kunvokis kunvenon de la partianoj en kiu estis speciale pridiskutita la starigo de lernejo. Per vivecaj faktoj de malestimo kaj ekskluzivo fare de la gubernia mezlernejo al gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj Vang

*Vang Hing eksplikas al la lernantoj la artikolon* Servu al la Popolo.




Hing montris la seriozan klasbatalon koncerne al starigo de lernejoj. Li diris: "La regpotenco de la lernejoj ne estas en la manoj de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, do iliaj pordegoj ne estas malfermitaj por ni. Ĝuste pro tio, ke la regpotenco de la lernejoj estas en la manoj de malbonuloj, multaj gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne povas eniri lernejojn." Tuj poste, Vang Hing organizis la ĉeestantojn studi la instruon de Prezidanto Maŭ, ke **"eduko devas servi al la proletara politiko, eduko devas kombiniĝi kun produkta laboro"**. Ili diris: "Antaŭlonge Prezidanto Maŭ jam difinis por ni la vojon de funkciigo de lernejoj. Se oni funkciigas ilin laŭ la volo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, do la elkulturitaj lernantoj povos servi al nia bono, jen estas la direkto, kiun Prezidanto Maŭ montris al ni. La plej grava afero por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en funkciigo de lernejoj estas bone teni la regpotencon en lernejoj." Kaj post la kunveno, la brigado aranĝis kunvenon de reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en kiu estis pridiskutita la starigo de lernejo. Ĉiuj aprobis la ideon de Vang Hing pri starigo de lernejo kaj unuanime elektis lin kiel la unuan lernejestron de la agronomia mezlernejo.

### LA UNUA LECIONO

Tuj post sia lernejestriĝo, Vang Hing jam proklamis al la komunumanoj de la brigado: La agronomia mezlernejo estas fondita por kaj administrata de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Por viziti la lernejon, la gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj bezonas nek trapasi eniran ekzamenon, nek pagi lernokoston kaj nek havi aĝolimigon. Pri selekto de instruistoj, fikso de lernprogramo, konstruo de domoj kaj surpostenigo de la diplomitoj de la lernejo povas decidi nur la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Kiam la ĝojiga novaĵo pri la starigo de la lernejo disportiĝis al la publiko, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj gajiĝis, sed la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon uzurpintaj la gvidantecon de la komunumo grincigis siajn dentojn pro malamo. Ili kriis kun incitiĝo: "Eĉ brigado deziras starigi mezlernejon, tamen vi ne sukcesos, se la komunumo ne donas monon al vi. Eĉ se vi sukcesus, ni tamen ne rekonos ĝin."

Vang Hing respondis decideme: "Kial brigado ne povas starigi mezlernejon? Unue ni ne postulos monrimedon de la ŝtato, due ni ne ĝenos la ŝtaton. Ni starigos lernejon por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tutegale, vi rekonos nin aŭ ne, ni starigos agronomian mezlernejon kun neŝanĝebla decido." La 25-an de oktobro, 1964, oficiale inaŭguriĝis la agronomia mezlernejo fondita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Tajpingling. Tiutage, gefiloj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj eniris sian lernejon kun ŝprucanta ĝojo. La unua leciono kiun Vang Hing donis al la novaj lernantoj estis la verko de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo*. Kun profunda sentimento de la proletaro li diris al la lernantoj: "Veninte en tiun ĉi lernejon, vi antaŭ ĉio devas lerni bone verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti liajn vortojn kaj fariĝi novtipa klera kamparano kun socialisma konscio. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj starigis tiun ĉi agronomian mezlernejon por ke vi akiru ne altajn poentojn sed altajn pensojn. Homo kun la penso de Maŭ Zedong posedas kapablojn por servi al la popolo."


La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon fabrikis diversajn pretekstojn por malhelpi kaj subfosi la agronomian mezlernejon starigitan de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Tajpingling, kalumniante ke ĝi estas "nenorma", kun "malaltkvalita instruado" kaj "ne sufiĉe bonaj klasĉambroj" ktp. Al tio Vang Hing kaj la aliaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj respondis: "Kion signifas "norma"? Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj iras la vojon montritan de Prezidanto Maŭ, starigis lernejon por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj per niaj propraj manoj sen helpo de la ŝtato, tio ĉi ja estas ĝusta vojo. La t. n. "normigo" de la malnovaj lernejoj ja signifas la burĝaran "normigon" sidigi lernantojn en klasĉambroj, ke ili nur maĉadu tekstojn, abomenu fizikan laboron kaj ĉasu renomon kaj profiton. Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj bezonas ne tian "normigon", nek tiajn intelektulojn, nek tiajn posteulojn." En la batalado inter la du ideologioj kaj inter la du linioj, la agronomia mezlernejo de Tajpingling ĉiam pli firmiĝis, disvolviĝis kaj perfektiĝis.

## SUR LA ĜUSTA VOJO

Strikte kombinante sian edukan laboron kun la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj sciencaj eksperimentoj, la agronomia mezlernejo de Tajpingling disvolvis la revolucian lernostilon de interligo de teorio kun la realo kaj prenis la vastan terenon de la kamparo kiel siajn klasĉambrojn. Kian scion la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj bezonas, tian kurson oni starigas. La lernejo estas saturita de revolucia entuziasmo kaj la lernantoj ĉiuj estas

*Ili firme efektivigas kaj plenumas la gvidprincipon instruatan de Prezidanto Maŭ: Eduko devas servi al la proletara politiko kaj kombiniĝi kun produkta laboro. Kamarado Vang Hing donas lecionon pri agrikultura scio.*





*Vang Hing gvidas la lernantojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ.*

bis lian ideon kaj diris: "Kial distingi la brigadojn? Ja ĉiuj apartenas al la nova socio sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Oni povas dividi la regionon en brigadojn, sed la koro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la mondo estas nedividebla. Tute same, ĉu funkciigi unu aŭ dek klasojn. Se la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj nur liberiĝos en kulturo, ni volonte donos multe pli da labortagoj kaj monrimedoj kaj konstruos multe pli da domoj. Vang Hing, se alvenos lernantoj de aliaj brigadoj, vi akceptu ilin ĉiujn!"

Kiam komenciĝis la agronomia mezlernejo, ĝi havis nur unu klason. Nun pli kaj pli multaj lernantoj sin anoncis al ĝi kaj ne sufiĉas la klasĉambroj kaj pupitroj. Vizaĝe al tiuj malfaciloj, iuj proponis turniĝi al la komunumo por helpo, sed Vang Hing diris firmdecide: "Ne. Prezidanto Maŭ instruas al ni iri la vojon de sinapogo sur la propraj fortoj, do ni devas heredi la revolucian tradicion de la tiama universitato Kangda* de Jan-an en konstruado de lernejaj domoj per la propraj fortoj." Kaj ĉe Tajpingling disvolviĝis amasa movado de lernado de la spirito de Kangda. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj ekagis kune por konstruadi la lernejon dum irado de la instruado. En aŭtuno de 1965, estis konstruitaj 8 tute novaj klasĉambroj, kaj en la sekvanta printempo denove 8 novaj klasĉambroj. Ĉiam pli altiĝis la prestiĝo de la agronomia mezlernejo de Tajpingling inter la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la ĉirkaŭaĵo.

vivplenaj kaj energiaj, kio akre kontrastas kun la stato de la gubernia mezlernejo trans la vojo. Ĉion ĉi tion prenante en la okulojn kaj tenante en la koro, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la produktaj brigadoj en la ĉirkaŭaĵo unuj post aliaj postulis, ke la agronomia mezlernejo de Tajpingling akceptu iliajn gefilojn.

"Maljuna Vang, via mezlernejo havas lernplanon koncizan kaj praktikan kaj trovas plaĉon ĉe ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Mia pli juna frato volas veni al vi por lerni, nepre lin akceptu." La librotenisto de Hiadianzi-brigado elmetis tiun peton al Vang Hing.

"Vang Hing, via lernejo estas starigita por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. De la praavoj nia familio ne havas legscipovulon. Vi akceptu mian filinon por eduki ŝin servi en la estonto por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj." Onklino Ju de Jugiavejzi venis kun sia filino por peti enirpermeson.

Multaj lernantoj de aliaj brigadoj sin turnis al tiu ĉi lernejo kun peto por lerno. Vang Hing tre ĝojis pro tio kaj diris al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj: "Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj unuafoje starigis lernejon kaj tio plaĉas al la koro de la amasoj. Tio ĉi pruvas, ke nia vojo estas ĝusta. Mi opinias, ke ĉiu kiu volas lerni ĉi tie kaj venas al ni, devas esti akceptita, al kiu ajn brigado li apartenas." La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj apro-

## NEPRE TENI BONE LA POTENCON DE EDUKADO

La agronomia mezlernejo de Tajpingling plenkreskis en la ŝtormo kaj ondegoj de klasbatalo. Post komenciĝo de la granda proletara kultura revolucio, alte tenante la revolucian standardon **"estas prave ribeli kontraŭ la reakciularo",** Vang Hing kaj la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj de la lernejo akuzis kaj kondamnis per paroloj kaj dazibaŭoj la malnovan edukan sistemon kaj mal-

kaŝis la krimojn de la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon oponi kontraŭ la penso de Maŭ Zedong. Per siaj revoluciaj agoj ili konsternis la potenctenantojn en la komunumo. En la komenco, la lastaj kulpigis Vang Hing per elpensitaj krimoj, plurfoje ĉirkaŭatakis lin kaj senigis lin je ĉiuj oficoj.

La konspirado de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon subfosi la agronomian mezlernejon indignigis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn de Tajpingling. Ili protektis Vang Hing kaj kuraĝigis lin daŭrigi la batalon. "Estu trankvilaj!" diris Vang Hing kun plena memfido. "La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon povas senigi min je la oficoj, sed ili neniel povas forpreni de mi la ruĝan koron fidelan al Prezidanto Maŭ. Nur se mi ankoraŭ spiras, mi nepre faros revolucion sekvante Prezidanton Maŭ kaj ĝis la fino batalados kontraŭ tiuj potenctenantoj!" La revolucia ago de Vang Hing ricevis subtenon de la PLA-a propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. La revoluciaj amasoj de Gaŭgiadian-komunumo ribelis kontraŭ la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj deprenis de li ĉiujn de li uzurpitajn potencojn. Vang Hing, kiu eltenis la severan provon en la ŝtormo kaj ondegoj de klasbatalo, ĝuas fidon de la amasoj. Antaŭnelonge, la revoluciaj amasoj de Tajpingling unuanime elektis lin kiel ĉefkomitatanon de la revolucia komitato, kaj la revoluciaj amasoj de Gaŭgiadian-komunumo elektis lin kiel vicĉefkomitatanon de la komunuma revolucia komitato.

Post publikigo de la plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, ke **"en la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso"**, la gubernia revolucia komitato decidis aneksi la 17-an gubernian mezlernejon al la agronomia mezlernejo de Tajpingling kaj nomi ĝin Mezlernejo de "La Sepa de Majo", laŭ la postulo de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiam ŝultroportante la pezan taskon konfiditan de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, Vang Hing eniris la gubernian mezlernejon gvidante la propagandan taĉmenton de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la komunumo pri la penso de Maŭ Zedong kaj estis elektita de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj kiel ĉefkomitatano de la lerneja revolucia komitato.

Vang Hing kunportis al la lernejo la bonan tradicion de la agronomia mezlernejo. Dum la aŭtuna rikoltado en 1968, li diris al la lernantoj: "Prezidanto Maŭ diris, ke ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj administru lernejon ĝuste por ke vi estu kulturitaj en daŭrigantojn de la proletara revolucia afero. Vi devas bone studi la verkojn de Prezidanto Maŭ, aŭskulti la vortojn de Prezidanto Maŭ, kaj akcepti reedukon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj por fariĝi novtipaj kleraj kamparanoj kun socialisma konscio." Inspirate de la ekzemploj donitaj de Vang Hing kaj la reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong, la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj ĉiam pli profunde kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman edukan linion efektivigatan de la granda renegato Liu Ŝaŭki, ju pli ili kritikis, des pli fortiĝis ilia malamo al Liu Ŝaŭki kaj des pli ĝisfunda fariĝis ilia reformado. En la tuta lernejo aperis nova revolucia fizionomio de vivpleneco.

---

**Kangda — Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato (vd. EPĈ N-ro 2, 1967)*

*La Tajpingling-a Agrikultura Mezlernejo havas sian revolucian regularon por eduki la lernantojn varme ami laboron jam de infaneco. La lernantoj iras al la lernejo kun sterkokorboj. La bildo montras ke Vang Hing kaj lernantoj kune iras kolekti sterkon.*



ĜOŬ MINGHUA:

# Kulturado de Daŭrigantoj de la Komunisma Afero

LA Tangdong-a Elementa Lernejo estis fondita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj mem en la fino de 1964. En ĝi lernantoj ne nur lernas, sed ankaŭ partoprenas produktan laboron kaj aliajn laborojn laŭbezone. Tiam la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj petis min fariĝi la instruisto en ĝi. En la komenco mi pensis, ke post mia diplomiĝo en elementa lernejo mi vizitadis mezlernejon nur unu monaton kaj poste mi partoprenis la produktan laboron dum la sep sekvintaj jaroj, tial mi forgesis multon el la scioj akiritaj el libroj. Kiel mi povus plenumi la instruistan laboron? La gvidantoj de la produkta brigado plurfoje instigis min, sed ĉiufoje mi rifuzis. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al mi: "Antaŭ la Liberiĝo, Minghua, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj abunde suferis diversajn tiranaĵojn kaj ofendojn de bienuloj. Vi devas gajni gloron por ni!" Ili plie admonis min: "Ni ŝarĝas vin per tiu tasko ne nur por ke vi instruu al la infanoj iom legi sed por ke vi tenu la kulturan potencon por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj." Sub ilia helpo, mi liberiĝis de timemo kaj decidis preni sur min la taskon de instruado por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

## GRANDA DETRUO KAJ GRANDA KONSTRUO

Ekfunkciis la lernejo. Venis por ĝin viziti nur dudek kelkaj el la pli ol sesdek infanoj en la aĝo de lernado tra la tuta brigado. Krome, ankaŭ tiuj dudek kelkaj infanoj ne regule venis ĉiutage. Kio estas la kaŭzo? Mi malfermis la ruĝan trezoran libreton por peti instruon de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Ĉu vi ne povas solvi iun problemon? Faru do enketon pri ĝia nuna stato kaj ĝia historio!"** Mi decidis fari personan vizitadon por peti informojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Iutage mi vizitis la familion de Ĝoŭ Gianjing, lernantino de malriĉkamparana familio, kiu ofte forestis dum lecionoj. Ŝia patrino diris: "Prezidanto Maŭ fondis lernejon por ni. Kiu ja ne volas sendi siajn infanojn al ĝi?! Tamen, ni plenkreskuloj ne povus iri al laboro, se Gianjing irus al la lernejo, ĉar ŝia fratineto bezonas zorgadon." Aŭdinte la klarigon de ŝia patrino mi ekpensis, ke mi ligiĝas kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj koro kun koro, do iliaj malfaciloj

*Ĝang Hjuehua, lernantino de elementa lernejo funkciigata de la lokaj loĝantoj, jam povas manipuli abakon kaj registri kontojn nur post kvinjara lernado. Ŝi konstante registras kontojn por la produkta grupo kaj estas laŭdata de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.*





*La lernantoj de Daĝaj-a Elementa Lernejo ofte studas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Jen la lernantino kaj avino estas en studado.*

estas ankaŭ la miaj. En frua mateno de la sekvinta tago, mi iris al la familio de Gianjing, kondukis ŝin kaj brakportis ŝian fratinon al la lernejo. De tiu tago mi permesas, ke lernantoj povas kunporti al la lernejo siajn fratojn kaj fratinojn. Tiamaniere la lernantoj plimultiĝis.

Tamen, ankoraŭ iuj el la infanoj en la aĝo de lernado ne venis. Kial? Iutage mi faris viziton al la familio de Ĉen Cajkiu, filino de malriĉkamparano. Ŝia patrino diris: "Mi tre volus sendi Cajkiu al lernejo, tamen ne eblas lasi la dommastrumajn aferojn sen prizorganto, kaj la lernejo havas fiksitan tempon por lecionoj." La vortoj de la patrino de Cajkiu eklumigis al mi la vojon. Mi diris al ŝi: "Sendu Cajkiu al la lernejo, mi ĉiam estos preta instrui, kiam ajn ŝi venos." Baldaŭ ankaŭ Cajkiu kun granda ĝojo komencis viziti la lernejon.

Mi vizitis familiojn unu post alia por kolekti opiniojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili diris: "La lernejo akceptas novajn lernantojn nur unu fojon ĉiujare, pro kelkmonata malfruiĝo ili jam estas elfermitaj ekster la lernejo." "Lernejo havas feriojn en la tempo, ne kiam la agrikulturaj laboroj estas multaj sed kiam ili estas ne multaj." La kritikoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj senerare trafis la esencon de la reviziisma eduka linio kaj donis ankaŭ al mi profundan edukon. Do laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj surbaze de la opinioj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi komencis grandan detruon kaj grandan konstruon en la problemo "al kiuj la lernejo devas malfermi sian pordon". La lernantoj povas: eniri la lernejon sen la limigo en la aĝo; komenci la lernadon de ĉiu ajn tempo; promocii salte; lerni tuttage, duontage aŭ vespere; kaj ricevi lecionojn hejme okaze de ilia nevizito al la lernejo. Ni abolis vintran kaj someran libertempojn kaj anstataŭigis ilin per ferioj de agrikultura okupopleneco kaj de Printempa Festo kaj elaste aranĝis horojn por lecionoj: multe lerni en la tempo, kiam agrikulturaj laboroj malmultas. malmulte lerni kiam ili multas, kaj partopreni produktajn laborojn, kiam ili plej multas. Ni ŝanĝis la ses-jaran lernosistemon en kvin-jaran. Post tiuj ŝanĝoj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiuj sendis siajn infanojn al la lernejo. Ili laŭdis: "Tia aranĝo de la lernejo estas plene laŭ nia deziro. Ni kore dankas Prezidanton Maŭ kaj la Komunistan Partion de Ĉinio."

## KULTURADO DE DAŬRIGANTOJ DE LA REVOLUCIA AFERO

Nelonge post la funkciado de la lernejo montriĝis ke iuj lernantoj ne obeas disciplinon petolante dum la leciono. Miaj alvokoj kaj admonoj havis nenian efikon ĉe ili. Kion fari? Kun peto pri helpo por trovi la kialojn kaj elpensi kontraŭrimedojn, mi turnis min al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili trafe montris al mi: "Tiuj infanoj ne suferis en la malnova socio, nek konscias sian feliĉon en la nuna tempo. Kontraŭ la maldisciplinemo de la lernantoj, oni devas fari klasan edukon." Kiel bona estas ilia ideo! Mi tuj invitis maljunajn malriĉkamparanojn al la lernejo por eduki la lernantojn per komparo inter la nova kaj la malnova socioj; iufoje mi persone kondukis la lernantojn al la produkta brigado por aŭskulti raportojn pri la pasinta amaro kaj la nuna dolĉo. Krome, mi studis kune kun la lernantoj la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ. Kiam la lernantoj ekkomprenis ke la celo de la lernado estas por la revolucio, ili multe progresis en disciplino.

Mi estas lernanto kulturita de la malnova lernejo kaj iagrade venenita de la burĝara eduko. La enhavo de lecionoj kaj instruaj metodoj, kiujn mi uzis, estis esence malnovaj. Tion vidinte la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj admonis min: "Minghua, Prezidanto Maŭ postulas, ke ni kulturu lernantojn en klerajn laborulojn kun socialisma konscio. Sed la lernantoj, kiujn vi kulturis, ne scipovas legi verkojn de Prezidanto Maŭ, nek manipuli abakon kaj libroteni. Por kio ili taŭgas?" Iliaj vortoj multe min edukis, mi ripetade studis la instrukcion de Prezidanto Maŭ faritan en la 7-a de majo, kaj renovigis miajn instruajn materialojn kaj instruajn metodojn. Ni enkondukis la kurson de vortoj de Prezidanto Maŭ kaj prenas la klasan edukon kiel la ĉefan lernaĵon kaj elstarigas la proletaran politikon en klerigaj lecionoj. Por akceli la revoluciigon en la ideologio de la lernantoj, kune kun ili mi starigis studrondojn de la penso de Maŭ Zedong, kune kontraŭbatalis egoismon kaj kritikis reviziismon kaj disvolvis aktivadon de la "tri fidelaj" (senlime fidela al Prezidanto Maŭ, senlime fidela al la penso de Maŭ Zedong kaj senlime fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ). Mi krome kondukadis la lernantojn en la tri grandajn revoluciajn movadojn por sperti ventojn kaj pluvojn, kontakti kun la vasta mondo kaj ricevi hardadon. Maljunaj kamparanoj estas ofte invititaj en la lernejon por doni lecionojn de klasa eduko kaj de produkta laboro, kaj ankaŭ la lernantoj estas trejnataj por suriri la tribunon por praktiki la principon ke **"oficiroj instruas soldatojn, soldatoj instruas oficirojn kaj soldatoj instruas sin unu alian".** Ĉiuj



*Ĝoŭ Minghua klarigas al lernantoj sur kampo la plugadon per maŝino.*

# Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj pri la Eduka Revolucio en la Kamparo

EN la vasta kamparo de nia lando, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj deradike finis per sia administrado de lernejoj la regadon de burĝaraj intelektuloj super lernejoj, tiel ke la lernejoj en la kamparo povas kulturi daŭrigantojn de la revolucio laŭ la bezonoj de la revolucia afero de la proletaro. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre ĝojas kaj varme aklamas la venkon de la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ! Ili senĉese parolas pri la bonega situacio en la administrado de lernejoj fare de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

**Hie Sufen:** Prezidanto Maŭ instrukciis al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ke ni administru la lernejojn en la kamparo. Ni nepre devas fari tion. Antaŭ nelonge, sub la unueca gvidado de la revolucia komitato de nia komunumo, ni uzas nian potencon ankaŭ super la varbado de novaj lernantoj. Ni adoptis novan metodon en akceptado de novaj lernantoj en mezlernejojn el diplomitoj de elementaj lernejoj: la lernantoj estas unue elektataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la produkta grupo kaj kontrolataj de la produkta brigado. Poste, la komunuma komitato por varbi novajn lernantojn,

malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: Bone! Ja bonaj estas la reformoj!

Sub la nutrado de la penso de Maŭ Zedong kaj la rekta gvidado de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la lernantoj de nia lernejo rapide kreskis en la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj ilia spirita fizionomio profunde ŝanĝiĝis. Vang Hujlin, lernantino de malriĉkamparana familio, aktive partoprenas produktan laboron ĉiutage post la lernado, ne postulante laborpoentojn. Kiam estis ferioj de agrikultura okupoleneco, la lernantoj kolektis sur la kampoj defalintajn tritikspikojn kaj donis ilin al la brigado, neakceptante laborpoentojn. Ili diris: "Daŭrigantoj de la komunisma afero devas labori por la revolucio, sed ne por laborpoentoj."

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"En la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso."** En kombiniĝo kun la praktiko de la eduka revolucio, mi profunde sentas ke la instrukcio de Prezidanto Maŭ estas senkompare saĝa kaj senkompare korekta. Mi nepre aŭskultos la vortojn de Prezidanto Maŭ, firme apogas min sur la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj tutkore kaj tutanime funkciigos bone lernejon por ili.



*Membroj de la grupo pri instrua materialo, sub la organizo de la revolucia komitato de gubernio Gianjang, Siĉuan, profundiĝas inter amasojn kaj kolektas opiniojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pri kompilado kaj redaktado de instrua materialo.*

konsistanta el reprezentantoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj instruistoj de la lernejoj, decidas post diskutado. Por eniri mezlernejon, ne sole la stato de lernado de la lernantoj estas konsiderata, sed ankaŭ ilia penso kaj politika sinteno. En Dongfeng-brigado estas lernanto, kiu estas filo de iu preterkvalifikita kulako, kaj kies notoj en la lernejo ne estis malaltaj en ekzamenoj, sed li estis maldiligenta kaj malhonesta en fizika laboro. Krome, li ofte disputis kun la brigado en kompanio kun siaj familianoj. Ĉifoje, en la elektado de novaj lernantoj por mezlernejoj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne akceptis lin provizore kaj tion prokrastis ĝis pli poste kiam li korektos siajn erarojn. Mia juna frato havis malaltajn notojn en ekzamenoj kaj ankaŭ lia skribado estas malbona. Mi timis ofte ke li ne povos eniri en mezlernejon. Sed li varme amas la kolektivon kaj la fizikan laboron. Reveninte hejmen de la lernejo, li tuj laboras por la kolektivo diligente kaj neniam disputis pri laborpoentoj. Ĉiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj lin ŝatas kaj ĉi-foje unuvoĉe rekomendis lin akcepti en mezlernejon. Tia maniero de akceptado de novaj lernantoj trovas bonvenigon ĉe malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili diras: "De nun niaj gefiloj ne bezonas timi ke ili eble ne povos eniri en lernejon!"

**Ĝang Ginglin:** La malnova eduka sistemo estis varmbedo por la burĝara penso kaj konvena grundo por kulturi reviziismon. La travivaĵo de nia unua filo Vejdong bone pruvas tion. En la jaro 1962, li eniris en mezlernejon. De la sekvinta jaro li jam ŝanĝiĝis: li komencis esti elektema en manĝado kaj vestado kaj malkontentiĝi eĉ ĉe okaza manko de mono. En la tria jaro, li eĉ ne emis surmeti vestojn kun flikaĵoj. Konstatinte tion, kun indigno mi vizitis liajn instruistojn kaj parolis kun ili, tamen, tiuj burĝaraj intelektuloj ne nur ne subtenis min sed eĉ opiniis, ke mi ne scias ami mian infanon. Reveninte hejmen mi pensis: Se mi

lasus lin vivi tiamaniere, li nepre fariĝos sinjorido. Tio ne estas vera amo miaflanke, sed manko de devkonscio kaj malutilo al posteulo.

En 1965, Vejdong finis la studon en malsupera mezlernejo kaj ne eniris en superan mezlernejon. Reveninte al la vilaĝo, li montriĝis malĝoja tuttage, ne amis fizikan laboron kaj ĉiam aspiris havigi al si ian mensan laboron. Por doni favoron al Vejdong, la brigado taskis al li registradon de laborpoentoj. Sed li povis nek manipuli abakon, nek libroteni. En sia kelkmonata laboro, li faris multajn erarojn kiel poentisto. Tio vekis zorgemon de la partia filio kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado. Post kiam ili rakontis al li la suferplenajn historiojn de la vilaĝo kaj de malriĉaj familioj kaj instigis lin studi verkojn de Prezidanto Maŭ, Vejdong fine revenis al la flanko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Mia juna filo Vangĉun lernas en elementa lernejo funkciigata de la vilaĝanoj. Li estas tute alia ol la frato. Li ne estas elektema en manĝado kaj vestado. Li eĉ portas kun si ĉiutage korbon por sterkokolektado, kiam li vizitas lernejon. Li ne timas malpuron nek laciĝon, kaj varme amas fizikan laboron kaj la kolektivon. Kvankam li lernis ĝis nun nur kvar jarojn, tamen li scias manipuli abakon, povas bonorde noti la poentojn kaj kapablas skribi leterojn. Post lernohoroj li partoprenas en fizika laboro, kiam li trovas tempon, kaj vespere li helpas malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn en kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ. Ĉiufoje, kiam estas publikigita nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, li ĉiam ĝin propagandas kune kun siaj samlernejanoj ĉie en la vilaĝo. Vidante la kreskadon de Vangĉun, mi ĉiam ĝojas en mia koro. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diras, ke ju pli multaj estas tiaj lernantoj, des pli bone, kaj ke ni bezonas ĝuste tiajn daŭrigantojn de komunismo.

El la malsamaj montriĝoj de miaj du filoj, Vejdong kaj Vangĉun, kiuj lernis en lernejoj de du malsamaj edukaj sistemoj, mi profunde sentas: Se oni ne ĝisfunde frakasus la burĝaran edukan linion, la junuloj fariĝus reviziismaj kaj nia lando ŝanĝus sian ruĝan koloron. La lando de la proletaro neniam ŝanĝos sian ruĝan koloron, nur se oni serioze efektivigos la grandan instruon de Prezidanto Maŭ pri administrado de lernejoj fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

**Ĉen Kajvan:** En la fino de februaro de 1968, nia komunumo disvolvis la edukan revolucion kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis min kiel eksterlernejan neprofesian instruiston de la malsuperaj mezlernejaj klasoj por instrui la agrikulturan produktan scion. Estis

*Lugoŭkiaŭ-a Popola Komunumo fondis grupon pri administrado de lernejoj fare de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Jen membro de la grupo donas lecionon pri agrikultura tekniko al lernantoj.*





*Ĉen Hjuehiang, maljuna malriĉkamparano de Jankuang-komunumo, Kionghaj-gubernio, Hajnan-insulo, rakontas al la infanoj de elementa lernejo historiojn de la vilaĝo kaj familioj, por ke ili neniam forgesu klas-batalon.*

la sezono de printempa plugado, kaj la unua leciono, kiun mi donis, temis pri semĵetado de rizo.

En la nokto antaŭ mia unua leciono, mi turniĝadis sur mia lito kaj ne povis endormiĝi, pensante pri tio, kiel mi donu la unuan lecionon. Mi cerbumis kaj cerbumis ... Multaj pasintaĵoj venis al mia cerbo. Antaŭ la Liberiĝo, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laboris de generacioj por la bienuloj kaj plene suferis subpremadon kaj ekspluaton. En multaj generacioj, miaj familianoj ne sciis legi. Post la Liberiĝo, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj kamparanoj forskuis la jugon kaj deziris eduki niajn infanojn en lernejoj por ke ili fariĝu daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro. Sed la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj la de li reprezentataj bienuloj, kulakoj kaj burĝoj plenenergie batalis pri la juna generacio konkure kontraŭ ni kaj edukis ilin kiel siajn posteulojn. Iuj gefiloj de la laboranta popolo ŝanĝiĝis post kelkjara lernado. Ĉu ni ne suferus denove amaran vivon kiel antaŭe kaj surirus la malnovan vojon, se ni permesus al ili tiel fari? Ni devas nepre regajni al ni la posteularon. Pensante tion, mi trovis por mi metodon de instruado.

La sekvintan tagon, mi iris al la lernejo por instrui al la lernantoj semĵetadon. Kvankam mia temo koncernis teknikon, tamen mi komencis la lecionon per parolo pri sociaj klasoj. Mi diris, ke parolante pri semĵetado, unue ni devas scii, por kiu ni tion faras. En la malnova socio, iujare, mi kulturis kampon de rizplantidoj por bienulo. Kvankam miaj piedoj krevis, tamen mi ankoraŭ devis fari la pezan laboron en la kampo. La krevaĵoj larĝiĝis kaj sangis ĉiam pli. Nokte, la piedoj tiel doloris, ke mi ploris prenante ilin. Tutjare mi laboregis, sed mi eĉ ne havis rizon en mia kuirpoto en la jarfino. Nun, ni semĵetas por la revolucio, por nia ŝtato kaj por socialismo! Ni devas plenanime lerni la teknikon por akiri pli multe da greno subtene al la konstruado de la lando. Aŭdinte tion, la lernantoj estis tre kortuŝitaj kaj lernis kun granda atento. Ili ne nur akiris agrikulturan scion, sed ankaŭ ricevis klasan edukon.

Per simila metodo mi instruis al la lernantoj la teknikon pri kulturado kaj plantado de maizo kaj rizo. Mi ankaŭ gvidis la lernantojn kulturi altproduktajn eksperimentajn kampojn de rizo kaj maizo en nia brigado instruante al ili per imitiga

metodo, kiel semi, kiel flegi plantidojn kaj kiel almeti sterkon. Kun granda fervoro, la lernantoj ŝvitis kaj laboris kune kun mi. Tial la plantaĵoj ĉiuj donis bonan rikolton. Tiamaniere mi instruis kaj laborigis ilin. La lernantoj ne nur ellernis la produktan teknikon, sed ankaŭ progresis en sia ideologio. Multaj el ili aktive partoprenas en kolektiva produkta laboro post lernohoroj, studas produktan teknikon, organizis propagandan taĉmenton de la penso de Maŭ Zedong kaj studas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun komunumanoj. La komunumanoj fiere diras: "La lernantoj edukitaj de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ja multe diferencas de la antaŭaj." En la komenco, iuj instruistoj de la lernejo ne kutimiĝis al la novaĵo ke ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj donas lecionojn en la lernejo. Poste ili diris: Tiamaniere, la teknika leciono fariĝas tute viveca, ĉar ĝi estas komencita per klasa eduko kaj kombinata kun la praktiko.

**Ĵen Gengtian:** Foje, instruisto de la unua grupo de la kvara-jara klaso de Hubujingzi-a Elementa Lernejo ordonis la lernantojn solvi la matematikan problemon donitan en la lernolibro: Antaŭ la Liberiĝo, en la vilaĝo Ĝanggiacun estis tri familioj de bienuloj kaj kulako, kiuj posedis kune 480 muojn da kampoj, kaj 24 familioj de malriĉkamparanoj kaj dungitaj kampuloj, kiuj havis kune nur 48 muojn da kampoj. Kiom da obloj estas la familioj de malriĉkamparanoj kaj dungitaj kampuloj en rilato kun tiuj de la bienuloj kaj kulako? Kiom da obloj estas la kampareo posedata de la bienuloj kaj kulako en rilato kun tiu de la malriĉkamparanoj kaj dungitaj kampuloj?

Al la problemoj la knaboj rapide trovis la ĝustajn solvojn. Sed iuj el ili rigardis siajn respondojn kun dubo kaj mire demandis al la instruisto: "Kial tiom malmulte da familioj de bienuloj kaj kulako posedis tiom multe da kampoj? Kiel povis sin vivteni la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kiuj posedis tiom malmulte da kampoj?"

La instruisto faris teorian klarigon pri tio dirante ke la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estis subpremataj kaj ekspluatataj de la bienuloj en la malnova socio. Sed la geknaboj dubis, ĉu la klarigo de la instruisto estas vera, kaj iuj diris: "Ĉu vere estis tiaj la bienuloj kaj kulakoj?"

Mi prenis ĉi tion per la okuloj kaj tenis ĝin en mia koro. Mi pensis, ke la dubo de la knaboj pri la respondo de la instruisto estas la malbona rezulto de la reviziisma eduka linio antaŭenpuŝita de la granda renegato Liu Ŝaŭki: instrui kaj lerni apartigite de la praktikado, meti la notojn sur la unuan lokon kaj nur doni sciojn sed ne eduki la homojn. Tion ni ne devas lasi daŭri plu kaj nepre devas komprenigi al la knaboj kio estas klasa subpremado kaj klasa ekspluatado. Vicprezidanto Lin diris: "Se oni ne komprenas, kio estas klaso kaj kio estas ekspluato, oni ne povas scii revolucion." Kiel membro de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi decidis de nun doni la klasan edukan lecionon, por ke la lernantoj firme memoru la grandan instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ "**Nepre ne forgesu klasbatalon**". Kaj kun ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, mi iris en la klasĉambron de la unua grupo de la kvara-jara klaso.

Por diri la veron, kiel malriĉa kamparano, kiu plene suferis subpremadon kaj ekspluatadon de bienuloj kaj kapitalistoj en la malnova socio, mi neniam imagis eĉ en sonĝo suriri instruistan podion en lernejo, kaj tio ja estis la unua fojo en mia tuta vivo! Kune kun la instruistoj kaj lernantoj, mi tiutempe emocie hurais foje kaj refoje: "Longan vivon al Prezidanto Maŭ!" Mi diris: Dank' al Prezidanto Maŭ ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj prenis al ni la regpotencon, vivas nun feliĉan vivon kaj vi povas lerni ĝoje en la lernejo. Sed, en la malnova socio, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj suferis subpremadon kaj ekspluatadon de bienuloj, laboris por ili tutjare kaj vivis malpli bone ol iliaj hundoj kaj porkoj. Mi paŝtis porkojn por bienulo en nia vilaĝo, kiam mi estis okjara. Foje, mi revenis hejmen tagmeze kaj tiel perdis unu porkon. Pro tio la bienulo ne donis al mi manĝon kaj forpelis min. Tiam ĉiuj miaj familianoj estis dungitoj de la bienulo kaj loĝis en kaduka ĉambreto, ludonita de la bienulo. Mia kvarjara frato mortis pro malsano kaj manko de mono por kuraco. . . .

Ĉe mia akuzo kontraŭ la malnova socio, ekardis la malamo de la knaboj en siaj koroj kontraŭ la bienula klaso. Ili laŭte kriis: "Neniam forgesu la klasajn suferojn, ĉiam memoru la malamon plenan de sango kaj larmoj kaj faligu la senkorajn bienulojn!" Mi ĝojis el la tuta koro pro la altiĝo de klasa konscio de la knaboj.

Ankaŭ la instruistoj de tiu ĉi grupo ricevis profundan klasan edukon. Ili kortuŝite diris: "La maljuna malriĉkamparano solvis la problemon, kiun ni ne povis solvi en la klasĉambro. Kaj tio estas la vera solvo!"

# Feng Fuŝeng post la Suriro de Gvida Posteno


## OKUPI ĈIUJN POZICIOJN PER LA PENSO DE MAŬ ZEDONG

En julio 1965, Feng Fuŝeng, aktivulo de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en la tuta Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj estro de la kuirista grupo de aŭto-roto de iu trupo de la Aera Armeo estis transpostenigita al la provianta sekcio de la sama trupo por fariĝi ties politika vicdirektanto. Post nelonge li estis promociita al la ofico de politika direktanto. Kun ruĝa koro senlime fidela al Prezidanto Maŭ kaj firma decido okupi ĉiujn poziciojn per la penso de Maŭ Zedong, li suriris tiun gvidan postenon.

Veninte al la provianta sekcio, Feng Fuŝeng tuj alfrontis grandan problemon: Tiu ĉi sekcio ne estis juĝita kiel unuo kun kvar bonoj en sinsekvaj jaroj, iuj kamaradoj opiniis ke la kaŭzo kuŝas en tio, ke "la centra laboro de tri manĝoj en ĉiu tago" mem ne estas tre bone farita. Pli multaj opiniis, ke en la kreiva studo kaj kreiva apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ oni ne estas bone harditaj. Kaj Feng Fuŝeng organizis la kamaradojn por diskutado. Kune kun aliaj kamaradoj, li elmetis la faktojn, faris rezonadon, kaj konsultis verkojn de Prezidanto Maŭ pri la demando. Prezidanto Maŭ diris: **"Politika laboro estas vivlinio de ĉiu ekonomia laboro."** Ankaŭ Vicprezidanto Lin diris: Antaŭ ĉio estas necese vere posedi la penson de Maŭ Zedong, kaj tio estas plej grava. Dank' al studo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, la kamaradoj altigis sian konon kaj venis al la komuna konkludo: La ŝlosilo estas kreive studi kaj kreive apliki la penson de Maŭ Zedong por realigi la ideologian revoluciigon.

Dum kulturado de profunda klasa sentimento de senlima amo al Prezidanto Maŭ ĉe la kamaradoj kaj dum plialtigo de konscieco de studo de la verkoj de Prezidanto Maŭ, Feng Fuŝeng energie propagandis kaj efektivigis tutan serion da orientiloj, principoj kaj metodoj elmetitaj de Vicprezidanto Lin pri kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong, por helpi la kamaradojn "studi kun demandoj, studi kaj apliki kreive, kombini studon kun apliko, studi unue kion oni urĝe bezonas por rikolti tujajn rezultojn, kaj peni plej energie pri aplikado de ĉio studita." Krome, li venis al la dua manĝejo, studis la "tri popularajn artikolojn" kune kun tieaj kamaradoj, okazigis studajn kunvenojn pri apliko de la penso de Maŭ Zedong, resumis spertojn kaj tuj ilin disvastigis.

Feng Fuŝeng faris la ideologi-politikan laboron ĉe ĉiuj ĝis ties koro. Maljuna laboristo Gu Bingĵen laboras diligente, sed ne sufiĉe klopodis en studado de verkoj de Prezidanto Maŭ. Kun profunda proletara sentimento Feng Fuŝeng venis al lia hejmo kaj faris korelverŝadon kun li. Ambaŭ ili priparolis de la suferoj en la malnova socio ĝis la feliĉoj en la nova socio, ke sub la gvido de nia amata Prezidanto Maŭ la laboranta popolo de la tuta Ĉinio akiris liberiĝon, kaj ke la verkoj de Prezidanto Maŭ estas vivradiko de la proletara revolucio. Aŭskultante la parolojn de Feng Fuŝeng, Gu Bingĵen kapjesis de tempo al tempo. Ĉe adiaŭo, el sia ŝultrosaketo Feng Fuŝeng elprenis kaj enmanigis al li la libron *Kolekto de Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong*, unu notlibron, unu krajonon kaj paron da presbiopaj okulvitroj kiel donacojn. Kaj tiu 53-jara maljunulo emociiĝis ĝis larmado. Prenante la manon de Feng Fuŝeng li diris: "Direktanto, mi ne studis bone verkojn de Prezidanto Maŭ kaj sentas honton antaŭ nia amata Prezidanto Maŭ. Mi nepre lernos de vi, metos la studon de verkoj de Pre-



*Kamarado Feng Fuŝeng*

zidanto Maŭ en la unuan lokon kaj estos senlime fidela al Prezidanto Maŭ kiel vi."

De tiam, Gu Bingĵen ĉiutage ellitiĝas frue kaj enlitiĝas malfrue; kun la presbiopaj okulvitroj li serioze studas verkojn de Prezidanto Maŭ frazon post frazo kaj faras notojn vorton post vorto. Ju pli li studas, des pli varme li amas Prezidanton Maŭ. Li decidis servi al la popolo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"ekskluzive"** kaj **"senrezerve"**, kaj dediĉi ĉion sian por Prezidanto Maŭ. Post duonjaro, Gu Bingĵen fariĝis aktivulo de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ de la provianta sekcio.

Sub fervora helpado de kamarado Feng Fuŝeng, en la sekcio aperis nova situacio en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong. Kreskas nombro post nombro da novaj homoj **"ekskluzive"** kaj **"senrezerve"** servantaj al la popolo. De tiam, tiu ĉi sekcio estas juĝita kiel unuo kun kvar bonoj kaj fariĝis unu el la antaŭirantaj kolektivoj de la trupo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

## BRAVE DEFENDI LA REVOLUCIAN LINION DE PREZIDANTO MAŬ

En la granda decida batalo inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj dum la movado de la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, Feng Fuŝeng havas plej firman kredon en la koro: firme sekvi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ signifas venkon. Li brave sin ĵetis en la batalon por defendi la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ. En la komenca periodo de la granda kultura revolucio, sub la zorgo kaj subteno de Prezidanto Maŭ, la movado de ruĝa gvardio leviĝis tra la tuta lando, Feng Fuŝeng kondukis siajn batalamikojn entuziasme subteni revoluciajn agojn de la ruĝaj gvardioj. Kiam la junaj ruĝgvardianoj suferis ĉirkaŭatakon kaj subpremon de plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, li senŝanceliĝe staris ĉe la flanko de la junaj revoluciaj sturmantoj kaj batalis kun ili ŝultron ĉe ŝultro.

Kiam la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis la grandan batalan ordonon **"Bombardi la Komandejon"**, Feng Fuŝeng tuj sin ĵetis en la batalon por ĝisfunde frakasi la burĝaran komandejon estratan de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Li diris: "En la ŝlosila momento de la batalo inter la du klasoj, inter la du vojoj kaj inter la du linioj, sekundo da hezito signifas malfideli al Prezidanto Maŭ kaj perdi meriton esti batalanto defendanta la revolucian linion de Prezidanto Maŭ." Kiam li aŭdis el radio-disaŭdigo la batalan ordonon kritiki Liu Ŝaŭki, li tuj kun-



*Feng Fuŝeng, kiu ĉiam konservas sian originan naturon de ordinara laborulo, eksplikas la brilan verkon de Prezidanto Maŭ* Servu al la Popolo *al la kuiristoj, post sia laboro en la kuirejo.*

vokis komitatan kunsidon de la partia filio. Kun neretenebla indigno ĉiuj ĉeestantoj decidis okazigi en la nokto ĵur-kunvenon de la tuta sekcio por lanĉi ĝeneralan atakon kontraŭ Liu Ŝaŭki. Ĝuste tiam subite pluvegis. Sonis telefono, iu demandis: "Furiozas nun pluvego kaj ventego, ĉu la ĵur-kunveno ankoraŭ okazos?" Feng Fuŝeng senhezite respondis: "Certe, eĉ se falus glavoj!" Tra la tuta nokto Feng Fuŝeng ne fermis la okulojn kaj verkis skizon de mobiliza raporto por amasa revolucia kritiko. Je la kvara matene, ĉiuj kamaradoj de la provianta sekcio kolektiĝis kaj okazigis en la bataliono kunvenon por kondamni Liu Ŝaŭki. Feng Fuŝeng indigne malkaŝis al la ĉeestantoj krimojn de Liu Ŝaŭki intrigi por restaŭro de kapitalismo kaj eksplikis la gravan signifon de tiu batalo. La malkaŝitaj krimoj de Liu Ŝaŭki vekis senkomparan malamon de la revoluciaj batalantoj. Ekde tiu tago, en la sekcio fondiĝis ĝenerale murgazetoj fiksaj kaj migrantaj, destinitaj speciale por la amasa revolucia kritiko.

Feng Fuŝeng ĉiam staras en la unua vico de amasa revolucia kritiko kien ajn li iras. En majo 1967, kiam li revenis al sia hejmvilaĝo pro hejma afero, li ĵetis sin tie en la batalon de ĝenerala ofensivo kontraŭ Liu Ŝaŭki lanĉitan de la lokaj trupoj kaj popolo. Li faris en 30 tagoj 25 raportojn por kritiki Liu Ŝaŭki antaŭ revoluciaj amasoj en ĉirkaŭaĵo de sia hejmloko en radio de dekoj da lioj.

Feng Fuŝeng tiamaniere gvidis kamaradojn forte sturmi kaj brave batali sur la batalejo de la amasa revolucia kritiko.

### ĈIAM KONSERVI LA NATURON DE LABORULO

Tuj post sia suriro sur gvidan postenon, li ripetade studis la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **"La kadroj de niaj partio kaj ŝtato estas ordinaraj laboruloj kaj ne estas grandsinjoroj rajdantaj sur la nuko de la popolo."**

Li diris: "Kiam mi fariĝis kadro, ŝanĝiĝis al mi la ofico, sed la naturo de ordinara laborulo devas neniam ŝanĝiĝi."

Iutage kiam Feng Fuŝeng lavis en la kuirejo manĝilojn kune kun maljuna kuiristo Pan Ŝisong interbabilante, Pan subite demandis: "Vicdirek-

tanto, nun vi estas kadro kaj tiom multe okupata de aferoj, kial vi ankoraŭ lavas manĝilojn?" Tiu demando vekis lin al meditado: Kial la malnova batalamiko, kiu laboris kun mi 6 jarojn en la sama kuirejo, nun tiel diferencigas min de la kuiristoj? Kial la malnovaj batalamikoj ne plu vokas min "Fuŝeng", sed ĉiam "vicdirektanto"? Kial, kiam mi ĵus eklaboros enirinte la kuirejon, iuj kamaradoj tuj diras: "Vicdirektanto, lasu tion, iom ripozu!" Rigardante Pan Ŝisong, li pensis en si kaj detale observis por konstati: Ĉu la kamaradoj intence tenas sin fore de mi aŭ mi mem iel prenas al mi la sintenon de kadro? Fine li rimarkis, ke Pan Ŝisong surmetis bluzon kaj alte faldis la manikojn, kaj laboras tiel plenenergie, dum li mem ne estas en bluzo, nek tiel alte faldis la manikojn. En kio montriĝas preteco por laboro? Tiu kontrasto surprizis Feng Fuŝeng.

Nokte, li denove studis la instruon de Prezidanto Maŭ ke la kadroj estas ordinaraj laboruloj, kaj subite klariĝis al li: Ĉu li laboras vere kiel ordinara laborulo aŭ ne, tio koncernas la problemon, ĉu li komplete kaj ekzakte efektivigas instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Li diris kun profunda tuŝiteco: "Kiel kadro oni ne devas montri sin eĉ iom aparta, aparteco kondukos al disiĝo de la amasoj, al forgeso de la revolucio kaj al nefidelo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ."

De la sekvinta tago, krom la ore brilaj verkoj de Prezidanto Maŭ, en lia ŝultrosaketo troviĝas ankaŭ kuirista bluzo. Alirinte la kuirejon por labori li vestis sin same kiel siaj malnovaj batalamikoj. La kuiristoj ĉiuj diris: "Fuŝeng ankoraŭ estas nia malnova grupestro."

Feng Fuŝeng rigardas partoprenon en fizika laboro por konservi la naturon de ordinara laborulo kiel gravan aferon por kadro. Kien li iras, tie li laboras, tio jam fariĝas kutimo por li. Vidante lin ŝarĝita ĉiam per pli peza tasko, la kamaradoj zorgeme admonis lin: "Vi estas trolacigita, lasu al ni la fizikajn laborojn." Feng Fuŝeng respondis: "Vi povas ŝarĝi vin per ĉiuj fizikaj laboroj, sed ne povas preni sur vin ankaŭ la ideologian revoluciigon de la kadroj. La posteno por fizika laboro estas posteno por preventi kaj oponi reviziismon, por lerni de la amasoj kaj por senlime fideli al Prezidanto Maŭ, posteno, kiun mi devas neniam forlasi."

En majo 1967, Feng Fuŝeng estis transpostenigita al la komunika stacio de la sama trupo por fariĝi vicestro de ĝia politika departemento. En kelkaj mallongaj jaroj multe ŝanĝiĝis la pozicio de Feng Fuŝeng, sed lia naturo de ordinara batalanto ne ŝanĝiĝis nek lia penema kaj modesta laborstilo. La kadroj kaj batalantoj, kiuj laboras kune kun Feng Fuŝeng, samvoĉe laŭdas: "Feng Fuŝeng estas bona, lerninda modelo por ni."



*Dum la periodo de la 2-a Kongreso de Aktivuloj de la Aera Armeo en Studo de Verkoj de Prezidanto Maŭ, Feng Fuŝeng (maldekstre) interŝanĝas lernitaĵojn en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kun la kongresanoj el iu trupo de la aera forto ĉe la fronto de Fugian.*

MENG JONG:

# La Ruĝa Suno Brile Lumigas Profundan Montvalon

*La ruĝa suno brilas super Zuoŝu-mont',*
*En ĉiuj valoj viglas kursoj de la pens' de Maŭ Zedong,*
*L' instruad' de Prezidanto Maŭ varmigas nian koron,*
*Vizaĝon novan montras anguleto en transmura* foro.*

Tiuj versoj varme prikantantaj la penson de Maŭ Zedong estas verkitaj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tria produkta grupo de Zuoŝu-brigado de Huadian-komunumo, Gi-an-gubernio, Gilin-provinco.

La produktan grupon formas izola montvilaĝo situanta profunde en valoj sude de la monto Ĉangbaj ĉe la fronto de nia landlima defendlinio. La loko estas tia: En naŭ valoj kun dekok valbranĉoj, ĉie ja lokas respektive tri-kvar aŭ unu-du kabanoj kun loĝantoj. En la pasinteco, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj sinkaŝintaj en la Partio plenenergie oponis kaj blokadis la penson de Maŭ Zedong, tiel ke tieaj revoluciaj amasoj ĉiam ne povis aŭdi la voĉon de Prezidanto Maŭ. Tial la vilaĝo estis ankaŭ nomata "Morta Angulo". En la granda proletara kultura revolucio, propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de iu trupo de PLA alvenis al la vilaĝo transpasinte montojn. Ili propagandis la penson de Maŭ Zedong de domo al domo kaj funkciigis en la profundaj montvaloj kursojn de la penso de Maŭ Zedong. Tiel ekbolis la "Morta Angulo". Ĉiuj en la produkta grupo, de infanoj ĝis maljunuloj 70-80-jaraj, partoprenis la kursojn. Ilia spirita fizionomio deradike ŝanĝiĝis.

Ĉe la suda ekstremo de la vilaĝo estas loko nomata "Suda Ĉiela Pordo" pro la alteco de la monto kaj profundeco de la valo. En tiu profunda valo loĝas familio de la maljuna malriĉkamparano Ĝang Ŝihuj. Lia hejmo lokiĝas 2.5 kilometrojn for de la sidejo de la produkta grupo. Antaŭe, avo Ĝang tre malofte partoprenis en politikaj aktivadoj de la produkta grupo kaj pro tio oni donis al li kromnomon dio ĉe la "Pordo de la Suda Ĉielo". En la granda kultura revolucio, kamaradoj de la propaganda taĉmento venis al lia hejmo kaj helpis lin starigi en sia familio kurson de la penso de Maŭ Zedong. Avo Ĝang ne nur aktive studadis en sia familia kurso, sed ankaŭ venis ofte al la kurso ĉe la produkta grupo vespere kun lanterno kaj irbastono en la manoj.

Avo Ĝang tre serioze studis verkojn de Prezidanto Maŭ, kvankam li propre ne scipovis legi kaj presbiopiĝis pro sia maljuneco. En la kurso li atenteme aŭskultis, kiam aliaj voĉlegis, kaj hejmen reveninte li lernis vorton post vorto kaj frazon post frazo sub la helpo de sia plej juna filo. Tiamaniere, li fine povas parkere reciti la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ kaj kelkdekojn da liaj eldiroj. La brilo de la penso de Maŭ Zedong prilumas lian koron kaj li tute ŝanĝiĝis.Nun, kio okupas lian tutan penson, estas la revolucio kaj ŝtataj aferoj. Li aktive partoprenas la amasan revolucian kritikon. Aŭdinte la absurdaĵon "ekspluato estas merito" distrumpetitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, li indigne kondamnis en kritika kunveno: "Estas absolute nepermeseble ke Liu Ŝaŭki venenu kaj trompu la amasojn! Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj jam abunde gustumis la amaron de la malnova socio. Dum mia duona vivo mi laboregis kiel dungito por bienulo kaj fine estis forpelita el lia domo kune kun mia tuta familio. Tiam mi trovis neniun alian rifuĝejon ol la 'Pordon de la Suda Ĉielo', mi do fosis por ni kavon en tiu senhoma profunda montvalo por uzi ĝin kiel loĝejon kaj vivtenis nin per fruktoj el sovaĝaj arboj. Estas Prezidanto Maŭ, kiu savis mian tutan familion kaj havigis al ni la nunan feliĉan vivon. Ni kredas nek al la ĉielo nek al la tero, sed nur al Prezidanto Maŭ. Estas dumtaga sonĝo la fiintenco de Liu Ŝaŭki konduki nin al la erara vojo de kapitalisma restaŭro." Tiu forta kaj profunda kritiko de avo Ĝang multe edukis la komunumanojn. Ĉiuj diris: "'La maljuna dio' fariĝis kritikisto en la kurso de la penso de Maŭ Zedong."

---

**Temas pri la Granda Muro.*

# Verkoj de Maŭ Zedong
# Broŝure Eldonitaj en Esperanto

(Parto de la Verkoj post la Liberiĝo)

| | |
|---|---|
| Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo | 52 pĝ. |
| Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo | 68 |
| Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de Ĉinio pri Propaganda Laboro | 32 |
| De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo? | 8 |
| Unuiĝu la Popoloj de la Tuta Mondo por Frakasi la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn (Deklaroj kaj paroloj por subteni la usonajn nigrulojn, la popolojn de suda Vjetnamio, Panamo, Japanio, Kongolando (L.) kaj Dominiko en iliaj justaj bataloj kontraŭ la usona imperiismo) | 28 |
| Deklaro de Kamarado Maŭ Zedong, Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, por Subteni la Batalon de la Usonaj Nigruloj kontraŭ Perforta Subpremo | 8 |

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio


# Krei Novajn Meritojn por la Popolo

— Pri la Ruĝstela Kultivejo N-ro 2 de la Produkta kaj Konstrua Korpuso de Hingiang-a Armea Regiono

LA komandantoj kaj batalantoj, kiuj fondis la Ruĝstelan Kultivejon N-ro 2, estas heroa trupo, kiu partoprenis la Longan Marŝon de 25,000 lioj kaj akiris honoran titolon de Ruĝstela Trupo pro multfoja starigo de meritoj en defendo de Jan-an kaj aliaj famaj bataloj. De multaj jaroj, sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ke la Popola Liberiga Armeo restas ĉiam batal-trupo kaj samtempe produkt- kaj labor-trupo, ili batalas en la areo de Huoŝikjuan de Hingiang, por ekspluati la alkalan teron kaj konstrui kultivejon.

*Gvidaj kadroj de la kultivejo iras kune kun la revoluciaj batalantoj al la kampo por tie labori.*





*La vasta amaso de batalantoj de la armea kultivejo rigore kritikas la venenajn influojn de la kontraŭrevolucia reviziismo de la granda renegato Liu Ŝaŭki.*

Nun la areo, kiu havas diametron de kelkdek kilometroj, jam transformiĝis en belan oazon. Sur la salalkala tero, kiel oni diris antaŭe,

*Sen vent' blankaĵo kuŝas ĉie sur la tuta tero,*
*Kaj flugas ĝi ĉe blov' de vento plene tra l' ĉielo,*

aperis armea kultivejo kun pli ol 20,000 muoj da agroj. Dum 17 jaroj ili produktis por la ŝtato ĉ. 20,500 tunojn da greno kaj grandajn kvantojn da manĝebla oleo, betoj kaj kotono, kaj per tio kreis novan ekzemplon en transformado de la naturo. En la batalo por defendi la landlimon kaj socialisman konstruadon ili kreis novajn meritojn.

## I

Huoŝikjuan, kiu situas sude de la alta montĉeno de Tianŝan kaj norde de la senlime vasta dezerto Gobi, antaŭe estis fama en Hami-regiono kiel vasta alkala areo. Tie la sala kvanto entenata de la tero estis kelkdek milonoj ĝis pli ol 400 milonoj; la jara pluvokvanto estas nur 37 mm, dum la vaporiĝa kvanto superas 3,400 mm; troviĝis nek rivero nek kanalo, estis malfacile trovebla eĉ trinka akvo por homoj kaj brutoj, por ne paroli jam pri forlavo de alkalo kaj terkulturado. Antaŭ pli ol 30 jaroj, la ĉitiea feŭda reganto provis uzurpi tiun ĉi areon. Li laborigis centojn da malriĉaj kamparanoj por konstrui en du plenaj jaroj kanalon longan je pli ol 20 kilometroj. Sur ties fundo estis sternitaj multaj feltpecoj, tamen eĉ tiamaniere la alkondukita akvo tralikiĝis komplete kaj, por trompi la popolon, la reganto kreis fabelon, dirante ke la akvo sur Tianŝan estas "sankta akvo", kiun neniu ajn pensu alkonduki por kulturebligi teron.

Sed ĉia ajn malfacilo ne povas timigi la Popolan Liberigan Armeon armitan per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong. Dank' al la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĉio neatingebla en la malnova socio povas esti certe efektivigata! En la batalo por alkonduko de akvo per monthakado, ĉiuj batalantoj brave iris antaŭen kaj pene elfosis kanalon 37 km. longan por alkonduki la neĝakvon de sur Tianŝan.

La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en Hami estis multe ĝojigitaj kaj kura-



*Riĉa rikolto sur la salalkala tero.*

ĝigitaj de la grandskala akvoutiliga konstruado. Tamen troviĝis ankaŭ iuj bonkoraj maljunuloj, kiuj ambaŭmane tiris la intimulojn, kiuj liberigis ilian hejmlokon, kaj diris al ili kun profunda amo: "Ĉu vi timas, ke ni ne povus vivteni vin? Prezidanto Maŭ sendis vin savi nin mizerajn ujgurajn popolanojn, ni tra generacioj neniam forgesos la bonfaron de nia amata Prezidanto Maŭ. Se vi volas kulturi teron, ni ja volonte cedos parton el nia bona tero al vi, sed, ĉu io rezultiĝos el la klopodo konstrui kanalon sur Gobi?!" La komandantoj kaj batalantoj respondis: "Kamaradoj, ni estas trupo fondita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj trupo servanta al la popolo. Ni estas bataltrupo, kaj samtempe ankaŭ labor- kaj produkt-trupo. Kiom ajn alta estas Tianŝan, kiom ajn longa devas esti la kanalo, kaj kiom ajn granda estas la kvanto de salalkalo en la tero, ni nepre ilin venkos!" La bravaj vortoj kortuŝis la popolanojn ĝis larmoj. Iuj memvole anoncis sin por haki montojn kaj konstrui kanalon kune kun la trupo, kaj aliaj alsendis hami-melonojn al la batalantoj per azenoj por esprimi sian varman amon al PLA. La zorgemo de la loĝantoj stimulis la batalantojn, kaj ilia decido kaj fido pri ekspluato de la salalkala tero fariĝis ankoraŭ pli firmaj, kaj ĉiuj esprimis, ke ili nepre alkondukos la neĝakvon de Tianŝan al la salalkala areo per plej granda energio kaj en plej granda rapideco.

La kanalo, kiu kondukas de Tianŝan al Huoŝikjuan, longas je 37 km., kun fundo larĝa je pli ol du metroj kaj bordodeklivoj altaj je pli ol tri metroj, kiuj devis esti pavimitaj per ŝtonoj kaj cementitaj. Tio ja estis grandskala konstruo kaj tasko tre peniga. Recitante de tempo al tempo la instruon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon"**, la batalantoj luktis kontraŭ Tianŝan kun ŝtalaj borstangoj kaj martelegoj en la manoj. Pro manko de instrumentoj por fosado, la batalantoj laboris per pioĉoj kaj ŝoveliloj, kiujn oni uzis en la militaj jaroj; sen transportaj veturiloj, ili uzis ŝultrojn por porti. Dank' al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, ili fine sukcesis konstrui sur la dezerto Gobi kanalon 37 km. longan.

## II

Post la alkonduko de neĝakvo de sur Tianŝan, tuj disvolviĝis movado por kulturebligi la virgan


teron, kiu komenciĝis per forlavo de sal-alkalo. Krom la surfaca tavolo de la tero kun eksterordinare densa salalkalo, troviĝis sub ĝi krome solida tavolo da natrio sulfata ĉirkaŭ duonfuton dika, kiun trafante pioĉoj ektintis kvazaŭ kontraŭ ŝtonplato. Tio ja estis laboro ankoraŭ pli peniga ol la jam plenumita monthako kaj akvokonduko.

La batalantoj, kiuj multajn jarojn luktis kontraŭ la malamikoj sur batalkampo, tamen havis nenian sperton en ekspluatado de sal-alkala tero, kaj multaj kaj multaj malfaciloj staris antaŭ ili. En tia cirkonstanco, la korpusa partia komitato neniam hastis por solvi diversajn konkretajn malfacilojn, sed antaŭ ĉio studis kun la amaso la linion kaj penson de Prezidanto Maŭ pri armea konstruado kaj liajn brilajn "tri popularajn artikolojn". La brilaj figuroj de Bethune kaj Ĝang Side donis neelĉerpeblan forton al la komandantoj kaj batalantoj kaj kuraĝigis ilin brave marŝi antaŭen renkonte al la malfaciloj.

Ne havante nivelilojn dum la fosado de kanaloj por ellaso de alkalo, la batalantoj elpensis la rimedon mezuri per fusilcelilo; ne havante cementon, la batalantoj propramane ĝin fabrikis. Kiel oni konstatis, ke iu parcelo de alkala tero estas finlavita? Mankis tiam al ili ekipaĵoj por fari kemian analizon, la batalantoj do gustumis per la lango. Salgusta estas salo, adstringgusta estas alkalo kaj malvarmgusta estas natrio sulfata. Kiam mankis la tri gustoj, oni komencis kulturi la parcelon. La batalantoj diris kun humuro: "La agroj de nia kultivejo estis elgustumitaj buŝon post buŝo." Laŭ statistiko, la forlavitaj sal-alkalo kaj natrio sulfata de ĉiu muo da ĉitiea tero kun densa salalkalo kune atingis ĉ. 50 tunojn meznombre. Por finlavi iun parcelon oni bezonis pli ol du monatojn aŭ pli.

La lavado de la tero estis nur la unua paŝo por ekspluati salalkalan areon. Por bone kreskigi plantaĵojn, oni plue devis senigi la teron je salalkalo. La komandantoj kaj batalantoj de la Ruĝstela Kultivejo N-ro 2 ekkonis el sia praktiko de produkta batalo ke por venki sal-alkalon ne estas sufiĉa sole laborenergio, sed necesas ankaŭ scienco kaj tekniko. Dum multaj jaroj de ĝisfunda forigo de sal-alkalo, ili akumulis multajn valorajn sciencajn kaj teknikajn materialojn.

Sur la areo de la kultivejo antaŭe ne kreskis arboj, sed nun arbaroj sin sekvas zonon post zono, kaj en kaj ekster la kultivejo sur pli ol 2,000 muoj da tero estas plantitaj arboj, kaj estas krome pli ol 200 muoj da fruktĝardenoj de persikoj, abri-



*Traktoro kuras sur la vasta salalkala tero.*

kotoj, pomoj kaj vinberoj. Kaj la nombro de ĉevaloj, bovoj kaj ŝafoj, komencante de neniom, multiĝis nun ĝis pli ol 15,000. Ĉirkaŭ 90% de ĝia kultiva laboro estas meĥanikigitaj. En 1964, la Ruĝstela Kultivejo N-ro 2 estis honorita de la supera instanco per la glora titolo "La Daĝaj de Hingiang".

### III

En la senprecedenca granda proletara kultura revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj de la komandantoj kaj batalantoj de la kultivejo havantaj gloran tradicion firme efektivigis sinsekvon da instrukcioj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kaj dank' al tio aperis bonega kaj ĉiam pli bona situacio en revolucio kaj produkto. La vastaj amasoj de batalantoj kun profunda proletara sento al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ levis pli vaste kaj pli profunde novan altan tajdon de kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong. Dank' al tio okazis al ilia spirita fizionomio granda ŝanĝiĝo.

En la Kultivejo N-ro 2 estas kamarado Vang Benji, veterana batalanto de la Ruĝa Armeo, kiu partoprenis la Longan Marŝon de 25,000 lioj kaj nun gardas oletenejon ĉe la kultivejo. De dekkelkaj jaroj, li ĉiam diligente laboras. Por fari klasan edukon al la juna generacio, li konstante faras vizitojn de roto al roto kaj laŭdas kaj rakontas al la vastaj amasoj de kultivaj batalantoj la meritoplenajn heroaĵojn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la gloran batalan historion de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Por defendi la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ, li kune kun la vastaj amasoj de batalantoj de la kultivejo kritikis kaj kondamnis la krimojn de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la Ruĝstela Kultivejo N-ro 2. Li solene ĵuris antaŭ la portreto de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ: Por defendi Prezidanton Maŭ, mi kiel soldato maljuna, tamen firmvola, neniam ŝanĝos mian koron eĉ ĉe elverŝo de mia sango!

Sub la direktado de la orientilo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"firme teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj militpreparon"** la Ruĝstela Kultivejo N-ro 2 akiris denove senprecedence riĉan rikolton en 1968. Ĝia totala produktkvanto de greno atingis pli ol 2,500 tunojn, t.e. kreskis je pli ol 10% kompare al tiu de 1966, la plej alta en ĝia historio, kaj per tio ĝi kreis novan meriton por la granda proletara kultura revolucio.

## KURANTAJ AFEROJ

### DENOVA RIĈA RIKOLTO EN NIA AGRIKULTURO

En la jaro 1968, la agrikulturo de nia lando denove akiris riĉan rikolton. La produktkvanto de greno de la provincoj Anhuj, Gianghi, Hunan kaj Gujĝoŭ kaj la municipaloj Ŝanhajo kaj Pekino relative pliiĝis grandskale en komparo kun tiu de la riĉrikolta jaro 1967, kaj Hunan, Pekino kaj Ŝanhajo kreis la plej altan nivelon de grena produktkvanto en la historio. Nia lando akiris riĉan rikolton ankaŭ en produkto de kotono, juto, lino, kanabo, kokono, teo, tabako, fruktoj k.a. ekonomiaj plantaĵoj.


### LA FABRIKO DE SENJUNTAJ ŜTALTUBOJ DE LA ANŜAN-A FERŜTALA KOMPANIO SUPERPLENUMIS LA JARAN PRODUKTAN TASKON

Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Fabriko de Senjuntaj Ŝtaltuboj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio plene disvolvis la gvidan rolon de la laborista klaso kaj nur en 1968 sukcese provfabrikis por la ŝtato 96 novajn produktaĵojn kun progresinta nivelo kaj efektivigis 26 gravajn teknikajn renovigojn. Ekde julio, novaj produktaj rekordoj estas kreitaj ĉiumonate kaj multe superis la nivelon de la sama periodo de 1966, la rekorda jaro en la historio, kaj la jara produkta plano de 1968 estis je 32 tagoj antaŭdate plenumita.

# Dezerta Alkalejo Antaŭe, Riĉa Grenejo Hodiaŭ




Reformu la naturon por plivastigi la areon de agroj. Jen batalantoj de la Armeo por Ekspluatado de Virga Tero fosas irigaciajn kanaletojn sur virga tero por forlavi alkalon.



(Supre) Denova riĉa rikolto de greno.

(Dekstre supre) Gekadroj iras al kampo por fiziklaboro.

(Dekstre malsupre) Kiel bone kreskas ĉinaj brasikoj!





干革命靠毛泽东思想
大海航行
伟大的领袖
毛主席万岁
伟大的中国
共产党万岁



Veterana ruĝarmeano kamarado Vang Benji rakontas la revolucian historion de la starigo de la agrokultivejo al la gejunuloj.



Ordigo de la fluejo por irigaciado



# Riĉa Rikolto el sub Hajlo

EN la lastaj jaroj la agrikultura produkto de Daĝaj-brigado akiris sinsekvajn riĉajn rikoltojn. Aparte ĝojinde estas, ke Daĝaj-brigado gajnis en 1968 refojan riĉan rikolton el sub granda katastrofo de hajlo.

"Neelĉerpeblan forton kaj senliman energion havas homoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong." "Ja estas miraklo ke bone kreskas la plantaĵoj post tia katastrofo!" Jen la komuna percepto de la kamaradoj kiuj venis viziti Daĝaj por lerni de ĝi.

Estas efektive, ke la riĉa rikolto de Daĝaj-brigado en 1968 estas io eksterordinara.

En la unuaj tagoj de julio de 1968, prospere kreskis plantaĵoj. Subite falis eksterordinare granda hajlo. Ovosimilaj hajleroj daŭre falis pli ol dek minutojn. Tuj sekvis furioza ŝtormo kaj plu-

*Kune kun komunumanoj de Daĝaj, kamarado Ĉen Jongguj kreive studas kaj kreive aplikas la penson de Maŭ Zedong sur kamprando.*



vego. Pli ol 700 muoj da plantaĵoj suferis seriozan detruon. Forŝiritaj estis la folioj de maizoj kun tigoj rompitaj aŭ kuŝigitaj. Ankaŭ unu futon altaj miliplantidoj sur 120 muoj estis kuŝigitaj pro hajlo.

Laŭ komuna agrikultura scio, la vizitantoj antaŭkalkulis, ke oni rikoltos nur du aŭ tri dekonojn de normala rikolto.

Antaŭ tiel serioza natura katastrofo, la heroaj Daĝaj-anoj ne ĝemis, por ne paroli pri ŝanceliĝo en fido pri batalo por riĉa rikolto. Vespere de la katastrofa tago la brigado aranĝis plenan kunsidon. Sciiĝinte pri tio, tuj rapidis reveni kamarado Ĉen Jongguj kiu estis ĉeestanta alian kunvenon fore de la vilaĝo, kaj informiĝinte pri la katastrofa stato, li diris al la kadroj kaj komunumanoj: "La hajla katastrofo estas tre serioza. Sed nenian katastrofon timas ni Daĝaj-anoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong. Dum la lastaj pli ol dek jaroj, ĉu ni ne sukcesis konstrui novan socialisman Daĝaj dank' al la penso de Maŭ Zedong batalante kontraŭ la klasaj malamikoj kaj naturaj katastrofoj!" Li ankaŭ diris kun humuro: "Granda katastrofo signifas grandan ŝanĝiĝon! En 1963, nin trafis aparte granda diluvo, sed rezultatis ke teraj loĝejoj estis anstataŭitaj de ŝtonaj, agroj malbonaj fariĝis bonaj, produkto malalta fariĝis alta. Certe pli bonan rezultaton alportos al ni la nuna katastrofo!"

Kamarado Ĉen Jongguj diris tion, kio estis en la koro de la kadroj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj-brigado. Kamarado Gia Gincaj, estro de la brigada ligo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, aldonis: "Se tio estus en la malnova socio, ĉio estus perdita por ni sub tia katastrofo! En 1920, mi estis 11-jara kaj laboris por bienulo kiel dungito. Ĉi tie 40 tagojn regis sekeco. La kampuloj rikoltis nenion. Sole en nia vilaĝo Daĝaj mortis 40 homoj pro malsato. Nun dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la penso de Maŭ Zedong, kvankam la hajla katastrofo estas malbona afero, ni povos turni ĝin en bonan aferon."

Ekbolis batalo por akiri grenon el sub la hajla katastrofo.

En la batalo kontraŭ la aparte serioza hajlokatastrofo, la kadroj de la partia filio de Daĝaj ripetade studis la brilan verkon de Prezidanto

*En somero de 1968, tre granda hajlo trafis Daĝaj-brigadon. La bildo montras la brigadanojn alplanti miliplantidojn al la vakantaj spacoj post la katastrofo.*



*La Daĝaj-anoj alte tenas revolucian spiriton batali*



Maŭ *Labormetodoj de Partia Komitato*. Agante kun seriozeco laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"teni firme"** laboron, ili strikte aranĝis la laborojn kaj ĝustatempe ellaboris efikajn rimedojn kontraŭ la katastrofo. En ĉiu afero la kadroj des pli agis antaŭ la amasoj.

Informite, ke la akvego inundis la stalojn de la brigado kaj la loĝejojn de komunumanoj, kamaradoj Liang Bianliang kaj Guo Fenglian, la vicsekretarioj de la partia filio, tuj gvidis la amasojn brave salti en la akvon ĝisbruste profundan por savado. Post elsavo de brutoj, daŭris la elakvigo de objektoj. Tiutempe pli kaj pli furiozis la diluvo kiu ĉe ĉiu ajn momento povis engluti homojn. Ili hasteme persvadis la batalantajn komunumanojn ascendi altejon, sed mem persistis en profunda akvo por daŭrigi la savadon. Reveninte al la vilaĝo, kamarado Ĉen Jongguj rekte rapidis al la inunditaj lokoj kaj la damaĝitaj maizaj kampoj, tamen ne al sia hejmo, kiam li ĝin preterpasis. La akvego inundis ankaŭ la loĝdomojn de Ĉen Jongguj kaj Guo Fenglian, sed ili tute ne donis atenton al tio. La amasoj laŭdis: "Niaj brigadaj kadroj ne nur organizis nin studi la 'tri popularajn artikolojn', sed ankaŭ instruas nin apliki ilin en la batalo per siaj agoj."

Ekde la tago de la katastrofo, kamaradoj Ĉen Jongguj, Gia Ĉengĵang, membro de la partifilia komitato kaj samtempe brigadestro, kaj aliaj kamaradoj gvidis komunumanojn esplori de parcelo al parcelo la staton de damaĝo kaj ellaboris respektivajn reordigajn aranĝojn al diversaj plantaĵoj. La pli ol 700 muoj da plantaĵoj de Daĝaj-brigado situas dise sur 1,800 parceloj. Ĉiun parcelon trafis la katastrofo kaj ankaŭ sur ĉiu parcelo estis postlasitaj iliaj piedsignoj dum enketado. Ili decidis restarigi la kuŝigitajn maizojn kaj pli atente prizorgi la damaĝitajn. Post la hajlo kaj ŝtormo la miliplantoj sur 120 muoj da kampoj estis tute kuŝigitaj. Kion fari? Iuj proponis forigi la miliplantojn kaj denove kulturi plantaĵon rapidmaturan. Resuminte kune kun aliaj kadroj kaj komunumanoj la antaŭan sperton de plenigo de vakantaj spacoj per unuopaj transplantitaj miliplantoj, Ĉen Jongguj decide diris: "Ne forigi, sed transplanti. Forigo estas pasiva metodo. Bone transplanti kaj bone flegi certigos bonan rikolton." Ankaŭ komandantoj kaj batalantoj de iu trupo de la Popola Liberiga Armeo plenumantaj tie la taskon "subteni maldekstrulojn, subteni industrion kaj subteni agrikulturon" kaj efektivigi "milittrejnadon kaj militkontrolon", alrapidis por fari konsolon kaj helpi restarigi kaj transplanti plantidojn. Tio donis grandan kuraĝigon al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj.

*la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, disvolvis la sentime kontraŭ la naturo, venkis la katastrofon kaj akiris riĉan rikolton.*



En la batalo kontraŭ la katastrofo, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉiuj konkure iris al kampoj por labori kiel eble plej multe. Pri tio ĝuste kiel diris la heroaj Daĝaj-anoj: "En la batalo kontraŭ klasa malamiko ni neniom cedas, en la batalo kontraŭ la natura katastrofo ni luktas por ĉiu colo da tero."

La fama ferknabina taĉmento de Daĝaj konsistas el 26 feraj junulinoj, el kiuj la plej aĝa estas 22-jara kaj la plej juna 15-

jara. Sub la gvido de la estrino Guo Fenglian, ili ĉiutage iris frue al kampoj por milioplantado. Ili atente plantis kaj firme butis unu milion post alia, kaj la laboro iris rapide kaj bone; ankaŭ en sarko kaj resterko ili konkure faris sian plejeblon kaj fariĝis avangardo en la batalo kontraŭ la katastrofo.

Por konkeri la hajlan katastrofon, ankaŭ instruistoj kaj lernantoj de Daĝaj sin ĵetis en la batalon. Ili portadis plantidojn kaj akvon al la kampoj, en la tempo por intensa flegado ili aktive partoprenis sterkportadon. De malriĉ-kamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj en la produkta praktikado ili lernis tion kio estas neakirebla el lernolibroj. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis: "Nur tia lernejo povas elkulturi daŭrigantojn por la revolucio, por ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!"

La komunumanoj de Daĝaj ofte diras: "Starante sur Tigrokapa Monto kaj sopirante al Tiananmen, ni devas teni en nia koro la suferantajn laborantajn popolojn de la mondo." Tio montras, ke la Daĝaj-anoj diligente laboras kaj obstine batalas kontraŭ katastrofo ne nur por sia bona vivo kaj por konstrui bone Daĝaj-brigadon, sed ankaŭ por plena venko de la revolucio de la proletaro. Ĝuste ĉar Daĝaj-anoj starigis la penson terkulturi por la revolucio, tial ili manifestis sian firman volon kaj obstinan batalspiriton antaŭ la aparte serioza katastrofo. En la praktiko de batalo, ili profunde komprenis, ke la penso de Maŭ Zedong estas la plej potenca ideologia armilo por la ideologia revoluciigo de la homoj. Homoj armitaj per la penso de Maŭ Zedong timas nenion de la ĉielo ĝis la tero kaj povas krei ĉian ajn miraklon en la mondo.

Post kelkmonata peniga batalo realiĝis la deziro de Daĝaj-anoj gajni riĉan rikolton el sub la granda katastrofo. Post zorgema flegado 120 muoj da transplantitaj miliplantoj donis senprecedence abundan rikolton kun pomua produktkvanto de pli ol 400 kilogramoj. Tio je tri dekonoj superis la riĉrikoltan jaron 1967. Maizoj restarigitaj unu post alia donis kompare bonan rikolton. Ankaŭ en legoma produkto estis eksterordinara rikolto.

Daĝaj-brigado ne nur akiris riĉan rikolton en grena kaj legoma produktado, sed ankaŭ rompis



*La brigadestro Gia Ĉengjang (maldekstre) kaj la maljuna heroo Gia Gincaj (dekstre) interparolas kun ĝojo de venko pri la sperto de akiro de bona rikolto post la venko de la katastrofo dank' al la penso de Maŭ Zedong.*

# *Viveca Leciono*

## ŜI HJUEDONG

*Plenvoĉe laŭdan kanton ni kantas en amaso,*
*Svingiĝas feraj brakoj batante or-tamtamojn.*
*"En ĉio devas gvidi la laborista klaso."*
*Ekĝojas neregeble ni ĉiuj en aklamo.*

*Elkora rid' pentriĝis sur la trajtar' vizaĝa*
*De Majstro Ĝang jam je pli ol sesdek jaroj aĝa.*
*Tenante ruĝan flagon, li marŝas kun klasfratoj*
*Grandpaŝe kaj torente en universitaton.*

*"He, venu, gestudentoj! Ricevu vi junuloj*
*Nun unu lecionon de kruda malklerulo . . ."*
*Kaj Majstro Ĝang nudigas plenlarĝe sian bruston —*
*Vipvund-cikatro longas, ho, pli ol unu futon . . .*

*Ja kio estas premo kaj kio ekspluato,*
*Kaj kion ja signifas suferoj kaj malsato,*
*Eksplikas li tre klare, sisteme kaj logike.*
*Ha, kiel viva lia prelego politika!*

*Absurda la aserto — "merita estas ekspluato"!*
*Ĝi estas nur intrig' por retiri nin sub jugon feran.*
*"For Liu Ŝaŭki, la granda senhonta renegato!"*
*Ni ŝiru for de li lian trompan maskon belan!*

*Amasaj malkovrado, akuzoj kaj kritikoj*
*En ĉies kor' ardigas la flamojn de indigno.*
*Komplete entombiĝas l' eduklinio de l' burĝaro.*
*Kaj kvazaŭ la Rivero Flava torentas tajdo de BKR**

---

**Mallongigo de "batalo, kritiko kaj reformo" (vidu "Enciklopedieton" en EPĈ n-ro 1, 1968)*

---

malnovajn rutinojn kaj kaŭzis tre grandan ŝanĝiĝon en kultiva sistemo. Ĉerpinte lecionojn el la hajla katastrofo, anstataŭ unufoje ili plantis dufoje en unu jaro sur parto de kulturataj kampoj kaj per tio kreis pli favorajn kondiĉojn por pli-granda riĉrikolto en la estonto. La katastrofo alportis al Daĝaj pli novan ŝanĝiĝon, ĝuste kiel diris kamarado Ĉen Jongguj tuj post okazo de la katastrofo: "Granda katastrofo signifas grandan ŝanĝiĝon."

Ankaŭ estas aliaj rikoltoj nekalkuleblaj per ciferoj. Tio estas: la aparte granda hajlo pli multe stimulis la revolucian energion de Daĝaj-anoj, hardis ilian ŝtalan volon kuraĝi batali kaj kuraĝi venki, altigis ilian kapablon batali kontraŭ natura katastrofo.

En la tempo de komenciĝo de la brila jaro 1969, la heroaj Daĝaj-anoj levis novan altan tajdon de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto, por bonvenigi la okazontan 9-an Tutlandan Kongreson de la Partio.

# Abonu

# «EL POPOLA ĈINIO»




«El Popola Ĉinio» estas esperanta monata gazeto kun sinteza enhavo, bildoj kaj koloraj paĝoj.

La gazeto propagandas en diversaj formoj la penson de Maŭ Zedong, raportas brilajn atingojn de nia popolo en la socialisma revolucio kaj la socialisma konstruado sub la eminenta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Tiuj, kiuj volas aboni la gazeton, bonvolu turni sin al la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo (P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio).

Esperantaj kursanoj kaj junaj lernantoj de ĉiuj landoj ĝuas favoran abonon.

Estas bonvene, ke legantoj, kiuj fervore disvastigas nian gazeton, estu niaj perantoj. Tiuj povas rekte kontaktiĝi kun la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo aŭ la redakcio de la gazeto.

TIAN HIUKING*:

# La Ora Ponto al Komunismo

NIA Kilijing-a Popola Komunumo estas la plej frue starigita sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La 6-an de aŭgusto, 1958, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ persone venis al nia komunumo por ĝin inspekti kaj faris al la tutlanda popolo grandan alvokon **"la popola komunumo estas bona"** kaj tiamaniere kondukis centmilionojn da kamparanoj de nia lando sur la oran ponton al komunismo.

Dum sia inspektado, nia amata Prezidanto Maŭ tre ĝoje vizitis la domojn por maljunuloj, infanvartejojn, fabrikojn funkciigatajn de la komunumo kaj eksperimentajn kotonkampojn. La prizorgo kaj subteno de Prezidanto Maŭ donis al la tuta membraro de nia komunumo senliman forton, kaj fariĝis giganta movforto por senĉese antaŭenpuŝi ĉiujn niajn laborojn.

Sed la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, kiu reprezentas la interesojn de bienuloj, kulakoj, kontraŭrevoluciuloj, fiuloj kaj dekstraj elementoj, freneze atakis la popolan komunumon, kalumniante ke ĝi estas "starigita tro frue" kaj estas "tro grandaskala" kaj "fuŝita".

Ĉu la popola komunumo estis "starigita tro frue"? Ne, absolute ne. La popola komunumo aperis absolute nehazarde. Ĝi estis neevitebla produktaĵo de la disvolviĝo de la ekonomio kaj politiko de nia lando kaj prezentas neeviteblan tendencon de la antaŭendisvolviĝo de agrikultura kolektivigo. En la alta tajdo de la agrikultura kooperigo Prezidanto Maŭ jam montris: **"Malgrandaj kooperativoj, kiuj havas malmulte da membroj, agroj kaj monrimedoj, ne kapablas entrepreni grandaskalan mastrumadon kaj uzi maŝinojn. Tiaj malgrandaj kooperativoj, kiuj ankoraŭ katenas disvolviĝon de la produktaj fortoj, ne devas resti senŝanĝe tro longe."** En la jaro 1958, sub lumigo de la ĝenerala linio, aperis en Kilijing grandaskala, plenampleksa antaŭensaltego en la produkta konstruado. La origina organiza formo de altgrada agrikultura kooperativo, kiu estas malgranda en skalo kaj limigita en sia mastrumado sole de agrikulturo, pli kaj pli montris sin nekonforma al la bezonoj de rapida kaj grandaskala disvolviĝado de la produkto. Tiam en nia loko sin trovis 50,000 — 60,000 muoj da agroj, kiuj ne povis garantii rikolton pro sekeco aŭ stagnoinundo, kaj pro tio la kooperativanoj urĝe postulis komenci grandaskalan akvoutiligan konstruadon. Sed pro la interkruciĝo de la teritorioj de la vilaĝoj kaj kooperativoj tio ĉiam renkontis obstaklojn. En 1954 la ŝtato jam starigis ĉe ni traktoran stacion, sed la efikeco de la maŝinoj ne povis bone disvolviĝi, ĉar la altgradaj kooperativoj ĉiuj administris aparte kaj sur la agroj oni kulturis plantaĵojn ĉiu laŭ sia aparta plano sed ne unuece; sekve de tio la areo tiam plugata maŝine okupis nur 25% de la totala kulturata tero; krom tio, oni tute ne kapablis aĉeti kompare grandajn modernajn agrikulturajn instrumentojn kaj ne povis fari pli grandajn entreprenojn, kiaj industriaj kaj transportaj entreprenoj servantaj al agrikulturo, ĉar al malgrandaj kooperativoj mankas sufiĉe da homoj kaj fortoj. Tial, en la printempo de 1958, unuigi malgrandajn kooperativojn en grandajn jam fariĝis komuna voĉo de la vastaj revoluciaj amasoj. En la 4-a de julio, en varma jubilado de la vastaj amasoj de kooperativanoj, 56 altgradaj kooperativoj en Kilijing kuniĝis en unu grandan kooperativon. Tiu elmontris sian superecon tuj post la fondiĝo. Komenciĝis grandaskala produkta konstruado, kaj la starigo de industriaj, transportaj, komercaj kaj edukaj entreprenoj servantaj al la agrikulturo, kaj milicaj organizoj ankaŭ rapide progresis. En tiu ĉi objektiva situacio, laŭbezone naskiĝis la Kilijing-a Popola Komunumo — tute nova formo de socia organizo, kiu estas grandaskala, kombi-

nanta samtempe industrion, agrikulturon, komercon, edukon kaj militajn aferojn kaj unuiganta la registaran administradon kun la komunumo. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj varme laŭdis: "Komunismo estas paradizo, al kiu interpontas la popola komunumo."

Liu Ŝaŭki ankoraŭ kalumniis, ke la popola komunumo estas "tro grandaskala". Prave, la trajtoj de la popola komunumo ĝuste estas: unue grandeco kaj due komuneco. **"Pli da homoj signifas pli da diskutado, pli da entuziasmo kaj pli da energio."** Pro tio la popola komunumo havas senkomparan superecon. Sub la gvidado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj dank' al senkompara supereco de la popola komunumo, ni en dek mallongaj jaroj post la popolkomunumigo reordigis kaj dragis pli ol 800 riverojn grandajn kaj malgrandajn, nove fosis 32 kompare grandajn kanalojn por irigacio kaj drenado, konstruis pli ol 400 maŝinajn putojn kaj samtempe riparis 62 malnovajn putojn, tiel ke 70% de la agroj de la tuta komunumo donas riĉan rikolton timante nek sekecon nek stagnoinundon. La areo plugata maŝine plivastiĝis de 25% antaŭ la popolkomunumigo ĝis 80% de la totala kulturata areo nun. Krome, dank' al la giganta potenco de kolektiva ekonomio de la popola komunumo estis instalitaj sinsekve du ĉefaj alttensiaj elektraj linioj kun longeco de 67 kilometroj kaj 25 branĉaj linioj, kaj krome pli ol 440 diverstipaj elektraj motoroj. Tiel ĉiuj 43 brigadoj de la tuta komunumo jam uzas elektron en irigaciado, drenado, sensemigado de kotono, grenmuelado kaj oleelpremado. Pli ol 50% de familioj de kamparanoj jam uzas elektrajn lampojn en lumigado. Telefonoj troviĝas en ĉiuj brigadoj kaj megafonoj en ĉiuj vilaĝoj. Finfine venis la tagoj, en kiuj oni "ne uzas oleon por lumigo kaj ne muelas grenon per bovoj".

De dek jaroj, alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia komunumo venkis ĉiujn nigrajn ventojn kaj insidajn ondojn, kaj la popola komunumo fariĝas pli prospera de tago al tago. Precipe post la hardado en la batalo de la granda proletara kultura revolucio, tiu ruĝa standardo propramane starigita de Prezidanto Maŭ fariĝis pli brila kaj pli okulfrapa. La amasa movado de kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong neniam tiel disvastiĝis kiel hodiaŭ. Multe altiĝis ĉe la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la konscio pri klasa kaj linia batalo kaj firme stariĝis la ideo kulturi teron por la revolucio. Spirito povas ŝanĝiĝi en materion. La ideologia revoluciigo ĉe la vastaj amasoj de komunumanoj forte instigis la agrikulturan produktadon al grandaj antaŭensaltoj en sinsekvaj jaroj. Oni suriras la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kvazaŭ surgrimpante ŝtuparon: "Ĉiu paŝo estas pli alta". La elokventaj faktoj pruvas, ke nia popola komunumo estas ne fuŝita sed bone, eĉ bonege funkciigata.


*Intime interparolas komunumanoj sur kamprando.*




---

**La aŭtoro de ĉi tiu artikolo estas la ĉefkomitatano de la revolucia komitato de la Kilijing-a Popola Komunumo en Hinhiang-gubernio, Henan-provinco.*

*Maŝinriparejo de Kilijing-komunumo*



*La traktora stacio de la komunumo*






# Sendi Salon

En 1932, por ekstermi la Ruĝan Armeon en la soveta regiono de Gianghi, Ĉiang Kajŝek sendis grandan nombron da banditaj armeanoj al la distrikto okcidenta de iu rivero en Ganĝoŭ por gardi tie. Sur la transa bordo de la rivero estis la Ruĝa Armeo. Ne povante venki la Ruĝan Armeon en batalo, la Ĉiang Kajŝek-a banditaro kruele blokadis ĝin je salo, malpermesante la popolanojn sendi al ĝi salon. Se la banditaro kaptis iun kiu sendis salon al la Ruĝa Armeo, ĝi prenis lin kiel "celtabulon" en pafekzerco.

Antaŭ la Printempa Festo de tiu jaro, la Ruĝa Armeo sieĝis kaj atakis la urbon Ganĝoŭ. La Ĉiang Kajŝek-a banditaro ankoraŭ pli intensigis la blokadon al la rivero. Ili koncentris ĉiujn ŝipojn en ĝi kaj sendis banditajn armeanojn por ilin gardi. Ili pensis, ke tia faro absolute malebligas transsendon de salo trans la riveron.

Sed la malriĉaj popolanoj okcidente de la rivero ofte sendis salon al la Ruĝa Armeo per ĉiaj rimedoj, riskante sian vivon por subteni la armeon el filoj de la popolo.

Estis frosta vintra nokto. En kaduka kabano sude de la urbo Ganĝoŭ, Hongŝeng kaj lia maljuna kaj malsanema patro estis streĉe cerbumantaj por trovi metodon por sendi salon al la distrikto orienta de la rivero. Hongŝeng estis apenaŭ 16-jara junulo, kiu remadis ĉiutage flosojn en la rivero kune kun siaj patro kaj onkloj kaj scipovis naĝi tiel bone, ke li povis naĝi subakve duonon de la larĝo de la rivero je unu spiro. Ĉifoje ricevinte la taskon transporti salon trans la riveron, Hongŝeng tre ĝojiĝis. De sia infanaĝo li jam ricevis influon de la revolucio kaj delonge deziris vidi la Ruĝan Armeon. Kia honoro estis por li, ke li povis viziti ĉifoje la karulojn kun tia valora donaco! Sed kiamaniere oni povas sendi salon trans la riveron tra la blokado de la Ĉiang Kajŝek-a banditaro en tia frosta vetero? Ja spertoriĉa estis la patro, kiu elpensis lertan metodon, nome kaŝi la salon en bambuon tubigitan kaj poste reŝtopi la aperturojn. Estis facile kaj sekure naĝi kun ĝi trans la riveron.

Tagmeze de la sekvanta tago, Hongŝeng surmetis sian eluzitan vatitan jakon kaj iris al Ŝahekoŭ-pramejo ŝultroportante la bambuon plenan de salo. Rapidmove li trairis la arbaron kaj venis al la pramejo. Li vidis ke Ĉiang Kajŝek-a bandit-armeano paŝadas tien kaj reen en senventa loko sub montdeklivo, ŝultroportante fusilon, kun la manoj ŝovitaj en la manikojn. Hongŝeng iom sin trankviligis kaj iris renkonte al li kun ŝajnigita aplombo. La bandito kriis al li: "Kio vi estas?" Hongŝeng respondis: "Bambuvendisto!" La malamiko blekis furioze: "Kontroli!" Senurĝe Hongŝeng demetis la bambuon kaj malbutonumis sian vatitan jakon. La malamiko palpis lian tutan korpon kaj poste piedbatis lin je la postaĵo kaj kriis: "For!" Subpremante sian koleregon Hongŝeng surŝultrigis la bambuon kaj iris al la rivero.

Atinginte Ŝahekoŭ-pramejon, Hongŝeng ĉirkaŭrigardis kaj trovis ke neniu troviĝas tie. Li demetis la vatitan jakon, prenis la bambuon en siajn brakojn kaj saltis en la riveron. Ondoj levitaj de la frosta vento frapadis lian vizaĝon kaj malfaciligis lian spiradon. La rapida fluo lin portis tre malproksimen. Spite al la malvarmego Hongŝeng naĝis tutforte al la transa bordo.

Tiam la malamiko sur la bordo rimarkis, ke iu troviĝas en la rivero, kaj laŭte blekis: "Kio vi estas?" Hongŝeng levis sian kapon kaj respondis: "Mi kaptas bambuon." La malamiko kriis: "Al mi, sur la bordon!" Respondante per "Jes, tuj mi venos!" Hongŝeng naĝis energie al la orienta bordo. Trovante lian agon suspektinda, la malamiko klake ŝargis sian fusilon kaj kriis minace: "Mi pafos, se vi ne albordiĝos!" Hongŝeng ĉesigis sian remadon kaj respondis vizaĝe al la okcidenta bordo: "La fluo min portas al la orienta bordo, ne eblas por mi naĝi returnen!" Tiel parolante li naĝis energie ankoraŭ iom antaŭen. Paf! — la malamiko ekpafis al la ĉielo. Hongŝeng ĵetis rigardon al la orienta bordo kaj trovis, ke restas ankoraŭ ĉirkaŭ duono de la distanco. Kion fari? Tiam li ekmemoris, kiel lia patro estis forkaptita de Ĉiang Kajŝek-a bandita trupo por kulia servo kaj turmentita preskaŭ ĝis morto kaj kiel poste estis savita de onkloj en la Ruĝa Armeo; li ekmemoris ankaŭ la rakontojn de liaj patro kaj onkloj pri la amo de la Ruĝa Armeo al la malriĉuloj. Grandega forto stimulis lin subite sin turni kaj plenforte naĝi al la orienta bordo.

Fajfanta kuglo flugis al la rivero — la malamiko ekpafis al Hongŝeng. Sekvis ankoraŭ kelkaj pafoj kaj la kugloj levis akverojn sur la fluo. Pli kaj pli intensiĝis la pafado. Subite la maldekstra mano de Hongŝeng sensentiĝis, malfermiĝis, kaj lia korpo malsupreniĝis — Hongŝeng vundiĝis. Vidante, ke li estas trafita kaj dronas, la malamiko ĉesis pafi.

# Liu Ŝaŭki Estas la Ĉefkrimulo en Restarigo de Kapitalismo

PENG KUNHUANG

MI estas malriĉkamparano-komunumano de Tianhua-brigado, Ĉangŝa, Hunan-provinco. En la vintro de 1951, kiam mia malpliaĝa fratino Peng Mejhiu ĵus atingis la aĝon de dudek jaroj, ŝi gvidis niajn 9 familiojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj organizi, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ **"organiziĝu"**, la unuan interhelpan grupon en la tuta gubernio. Ni profunde konvinkiĝis pri tio, ke **"Nur socialismo povas savi Ĉinion."** En la malnova socio ni malriĉuloj estis piedpremataj de bienuloj kaj lokaj tiranoj. Ni estas plej fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj plej decidemaj en irado de la socialisma vojo. Ni ĉiam iris plej antaŭe en la tuta gubernio, ĉu en fondo de interhelpa grupo kaj elementa kooperativo aŭ en fondo de alta kooperativo kaj popola komunumo. Ĉar ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj decideme iris la vojon de socialisma kolektivigo, rapide ŝanĝiĝis la fizionomio de la malriĉa montvalo de Tianhua. Nia produkta kvanto de greno en 1960 atingis proksimume duoblon de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo, kaj nia brigado, kiu antaŭe bezonis konsumi la grenon provizatan de la ŝtato, ekhavis superfluan grenon, kaj fariĝis ruĝa standardo de la tuta gubernio kaj la tuta provinco en persista irado de la socialisma vojo.

Tamen, ĝuste kiel nia amata Prezidanto Maŭ instruas al ni, ankoraŭ ekzistas enlande klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo post la Liberiĝo de la tuta lando. En la kamparo la klasbatalo okulfrape elmontriĝis en la problemo ĉu decideme iri la socialisman vojon aŭ oponi. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ gvidas nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn firme iri la socialisman vojon, tio ja celas likvidi kapitalisman ekspluaton kaj efektivigi agrikulturan kolektivigon en la kamparo. Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki plenforte provis tiri nin al la kapitalisma misvojo. En aprilo de 1961, Liu Ŝaŭki kun siaj fidelaj lakeoj enŝteliĝis en nian Tianhua por restarigi kapitalismon sub la nomo de "laboro en elektita punkto por akiri sperton". En la sekvanta tago post sia alveno al Tianhua, li urĝeme kunvokis kunvenon de kadroj de la brigado kaj malice postulis ke ili multe malkovru "problemojn". Kiam kamaradino Peng Mejhiu parolis pri la grandegaj atingoj

---

Hongŝeng surfundiĝis, englutis plenbuŝojn da akvo kaj denove sin surakvigis kun forta volo. Li kaptis la bambuon sur la akvo kaj naĝis energie al la orienta bordo.

Finfine li sukcese atingis la orientan bordon. Per sia lasta forto li sin trenis sur ĝin kun la bambuo, apenaŭ faris kelkajn paŝojn kaj svene falis sur la teron....

Kiam Hongŝeng rekonsciiĝis, li trovis sin kuŝanta en varma lito kun la maldekstra mano jam vindita per bandaĝo. "Kie mi estas?" li kriis kun miro, "Kie estas mia bambuo?" Iu kamarado el la Ruĝa Armeo kun ruĝa rubando ĉirkaŭ la brako karesis lian febran frunton per sia varma manego kaj diris: "Bona frato, la salon ni jam ricevis!"




*La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Tianhua-brigado, Ĉangŝa, Hunan-provinco, indigne kondamnas la ĝisĉielan krimon de Liu Ŝaŭki disvastigi venenon en tiu brigado en 1961 por restaŭri kapitalismon.*

akiritaj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Tianhua sub la direktado de la granda penso de Maŭ Zedong, tiu fiulo Liu Ŝaŭki malpacience diris, svingante sian manon: "Ne plu parolu pri viaj atingoj. Viaj atingoj jam troviĝas en tiu ĉi dika volumo! Pri atingoj sufiĉas paroli 80 elcentojn por 100 elcentoj, sed pri mankoj, por 80 elcentoj, oni povas paroli 90 aŭ 100 elcentojn kaj eĉ ankoraŭ pli multe." Vidu, kian malamon havis tiu malnova renegato kontraŭ nia irado de la socialisma vojo! Post la kunveno de kadroj li persone invitis al si tiujn, kiuj "havas opiniojn kaj kuraĝas paroli", por peti de ili "opiniojn". Inter tiuj homoj iuj havas seriozajn problemojn en sia historio, aliaj estas dekstraj oportunistoj aŭ spekulaciistoj. Akirinte iom da "materialo" el tiuj homoj, li senbride fabrikis kontraŭrevolucian publikan opinion dirante: "La ruĝa standardo de Tianhua estas falsa kaj fanfarone kreita." Tiam li persone svingis buĉistan tranĉilon intencante dehaki tiun ruĝan standardon. Li pledis por "dividi agrojn inter produktaj grupoj aŭ laborfortoj por mastrumi aparte", "asigni al komunumanoj kampeĝojn, virgan teron kaj nekulturatajn placojn kaj interspacojn por individue kulturi", kaj "dividi ankaŭ arbaron sur montoj inter diversaj familioj por mastrumi aparte". Sub tiuj nigraj instrukcioj de Liu Ŝaŭki enmerkatiĝis serio da kapitalismaj nigraj varoj, kiaj "sistemo de prirespondo pri produkta kvanto", "dividita mastrumado de arbaro sur montoj", "suben lasi la kolektivajn flankokupojn al individuoj", "nuligo de provizado de baza grenporcio" kaj malfermo de "liberaj merkatoj". Ĉio ĉi tio ĝojigis la grandan renegaton Liu Ŝaŭki. Li babilaĉis, ke nur tiel oni povas "venki egalismon, mobilizi sian aktivecon" kaj havigi al si "profiton kaj perspektivon".

La granda renegato Liu Ŝaŭki tute miskalkulis. Opiniante, ke kapitalismo povos esti senbare efektivigita en Tianhua, li ne atendis, ke tuj ĉe la komenco tio renkontis firman kontraŭstaron de ni vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Pro sia tutkora fideleco al Prezidanto Maŭ, mia fratino Peng Mejhiu disvolvis la sentiman heroan spiriton **"se mortpunon per mil tranĉoj oni spitas, imperiestron tiri de sur ĉevalo oni ne hezitas"** kaj faris batalon kontraŭ Liu Ŝaŭki vizaĝo kontraŭ vizaĝo. Antaŭ kamaradino Peng Mejhiu armita per la penso de Maŭ Zedong, la vera fizionomio de tiu malnova renegato, kiu prenis sin kiel "imperiestron", plene malkaŝiĝis. Tiam li ekkoleris pro honto kaj faris de diversaj flankoj kruelajn batojn kaj persekutojn kontraŭ kamaradino Peng Mejhiu. Dum dek ok tagoj de sia restado en Tianhua tiu malnova renegato Liu Ŝaŭki faris ĉiajn malbonajn aferojn. Li estas morta malamiko de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

# Entombigi "Teorion pri Estingiĝo de Klasbatalo"

GIAŬ ĜAŬHAJ*

LA granda proletara kultura revolucio de nia lando estas saturita de ekstreme komplika kaj akra klasbatalo. Mi estas ordinara laboristo-partiano. Hardite kaj provite en tiu ĉi granda revolucio, mi pli profunde ekkonis, ke granda kaj ĝusta estas la teorio de Prezidanto Maŭ pri klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo en la socialisma socio.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruas al ni: **"Socialisma socio estas sufiĉe longa historia periodo. En la socialisma historia periodo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, ekzistas batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo kaj ekzistas danĝereco de restaŭro de kapitalismo."** La granda instrukcio de Prezidanto Maŭ estas potenca ideologia armilo por konduki klasbatalon kaj firmigi la proletaran diktaturon sub la kondiĉoj de socialismo en nia lando.

De longa tempo la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki freneze oponis kontraŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, senbride distrumpetis la "teorion pri estingiĝo de klasbatalo", parolaĉante pri tio, ke "jam estas solvitaj la ĉefaj kontraŭdiroj inter la proletaro kaj burĝaro", "ankaŭ la burĝaro estas fundamente ekstermita", ke kapitalistoj "jam ne volas rezisti

*La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko rigore kritikas la reakcian burĝaran linion de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la nomita fabriko, kune kun PLA-anoj senditaj en la fabrikon.*






*La revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Dua Il-maŝina Fabriko de Ginan senkompate kritikas la reakcian absurdaĵon de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki pri "administrado de fabrikoj per specialistoj", kiun li disvastigis en 1958 en tiu fabriko, kaj ĝisfunde likvidas la kontraŭrevoluciajn krimojn de Liu Ŝaŭki kaj liaj komplicoj.*

kontraŭ socialismo" kaj ke ankaŭ ili povas "aliĝi al la Partio". Unuvorte, jam ne ekzistas klasoj kaj klasbatalo.

El la propraj suferoj de ekspluatado kaj subpremado antaŭ la Liberiĝo kaj el praktiko de akra kaj komplika klasbatalo post la Liberiĝo, ni ĉinaj laboristoj tute komprenas, kia varo estas la "teorio pri estingiĝo de klasbatalo" de Liu Ŝaŭki!

En la malnova socio Santiaŭŝi de Tiangin estis kvazaŭ infero por laboristoj. Enirinte en fabrikon sennombraj metilernantoj devis kontraŭvole skribi "kontrakton pri sinvendo" kaj suferis ĉiajn kruelajn ekspluatadojn kaj turmentadojn. Tage kaj nokte multaj laboristoj estis subpremataj kaj ekspluatataj sub vipado de la reakciaj kapitalistoj, en malhelaj kaj kadukaj muldejoj, ĉe simplaj kaj pezaj maŝinoj. Ili "ellitiĝis frumatene je la kvara horo, enlitiĝis je la unua de la sekvinta tago laborегante profundan noktom per martelo". Kiom da klasaj fratoj estis sangelsuĉitaj kaj forpelitaj el fabrikoj en Santiaŭŝi! Kiom da laboristoj-fratoj mortis pro frosto kaj malsato!

Ruĝas la oriento kaj leviĝas la suno. Nia amata Prezidanto Maŭ liberigis nin laboristojn de Santiaŭŝi el la homa infero. Tiuj, kiuj estis traktataj kiel brutoj en la malnova socio, fariĝis mastroj de la nova socio. Grincante per la dentoj la burĝaro ĝismorte malamas la liberiĝon de la ĉinaj laboristoj kaj ĉiam sonĝas pri restarigo de la perdita edeno. La tiel nomata "estingiĝo de klasbatalo" estas centpocenta trompa absurdaĵo!

De post la Liberiĝo neniam ĉesis la klasbatalo en Ĉinio. Ni prenu nian fabrikon kiel ekzemplon. Sub la ŝirmo kaj konfido de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon la reakciaj kapitalistoj, kiuj antaŭe ekspluatis kaj subpremis nin laboristojn, denove tenis la potencon de produktado, superregis kaj disponis nin laboristojn. Tiuj potenctenantoj fidis al kaj sin apogis sur kapitalistoj kaj faris premon al ni vastaj amasoj de laboristoj dirante, ke "partianoj kaj laboristoj estas malpli obeemaj ol kapitalistoj". Ili senkaŝe postulis, ke laboristoj prenu kapitalistojn kiel instruistojn, eĉ diris al kapitalisto en kunveno: "Ni ne parolu pri politiko, vi prezentu vian sperton

pri negocado por ke ni lernu." Vidu, kiel tiuj potenctenantoj en nia fabriko kolportis nigran varon de "teorio pri estingiĝo de klasbatalo" de la granda laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj komplicoj.

Laŭ la nigra instrukcio de Liu Ŝaŭki tiuj potenctenantoj en nia fabriko ankoraŭ ĉiamaniere provis tiri kapitalistojn en la Partion kaj eĉ lasis ilin partopreni kunvenojn de la partia filio. Ili malpermesis partianojn kaj vastajn laboristajn amasojn studi verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj moligis ilian revolucian volon de batalado kontraŭ klasaj malamikoj, predikante, ke "bonaj partianoj estas lertaj en produktado kaj laborado kaj obeemaj", tiel ke venenite iuj partianoj ne zorgis pri politiko kaj dronis nur en produktado. Rilate al la progresemuloj de la proletaro kiuj havas altan konscion pri batalo inter la du linioj kaj firman koncepton pri klasbatalo kaj kuraĝe batalas kontraŭ la klasaj malamikoj, ili faris forpuŝon, donis baton kaj ne permesis ilin aliĝi al la Partio.

La vivaj faktoj pri klasbatalo diras al ni, ke la batalo inter la proletaro kaj burĝaro estas tre akra kaj komplika en la kondiĉoj de socialismo. La burĝaro ĉiurimede provas restarigi la hommanĝan ekspluatan sistemon, kaj la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon ĝuste estas ĝiaj agentoj. La "teorio pri estingiĝo de klasbatalo" fabrikita de Liu Ŝaŭki ĝuste celas paralizi nin laboristaron kaj helpi la burĝaron en ĝia freneza atako kontraŭ ni, por ke la burĝaro denove rajdu sur nia nuko kaj tiranu. Li intencis ŝanĝi la proletaran diktaturon, kiun ni akiris per sennombraj vivoferoj sub gvidado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, en la burĝaran diktaturon, kaj efektivigi restaŭron de kapitalismo, por ke ni laborista klaso denove suferu la antaŭajn amarojn kaj denove falu en inferon.

Liu Ŝaŭki klopodis kovri klasbatalon kaj plenforte disvastigis sian nigran varon de "teorio pri estingiĝo de klasbatalo", tio ĝuste pruvas, ke li estas centpocenta renegato kaj lojala lakeo de la burĝaro.

En la granda proletara kultura revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ ni ĉinaj laboristoj reprenis el la manoj de tiuj potenctenantoj en nia fabriko la de ili uzurpitan parton da potenco post intensa kaj komplika batalado. Vicprezidanto Lin montris: "Kun la regpotenco la proletaro kaj laboranta popolo havas ĉion. Sen ĝi la proletaro kaj laboranta popolo perdas ĉion." Sen la proletara diktaturo ni laborista klaso havas nenion. Kiam la burĝaro ĝojas, ni laborista klaso devas suferi. La klasbatalo estas batalo vivmorta. Se ni iom malstreĉas la singardemon, do la malamiko intensigas sian atakon kontraŭ ni. Firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"nepre ne forgesu klasbatalon"** ni ĉina laborista klaso nun klopodas komplete likvidi la venenan influon de "teorio pri estingiĝo de klasbatalo" de Liu Ŝaŭki, firmigi kaj plifortigi la proletaran diktaturon, por ke la fera ŝtato de la proletaro neniam ŝanĝu sian koloron.

---

**La verkinto estas laboristo de Pesila Fabriko de Santiaŭŝi, Tiangin.*





*Kune kun la kamaradoj de la propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de PLA, la revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la putodrila trupo n-ro 1202 de Daking senkompate kritikas la kontraŭrevolucian krimon de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, ke li venis iam al Daking por distrumpeti sian "teorion de estingiĝo de klasbatalo".*

# Oceana Ŝipo "Gao Yang" Estis Surakvigita

EN la triumfa kanto de batalo por la ĉiuflanka venko de la granda proletara kultura revolucio estas sukcese surakvigita "Gao Yang", la alia 10,000-tonela oceana ŝipo projektita kaj konstruita de Ĉinio.

Disvolvante la revolucian spiriton kuraĝi pensi kaj agi, sinapogante sur la propraj fortoj kaj strebante al prosperiĝo, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de Ruĝflaga Ŝipkonstruejo de Ŝanhajo sukcese plenumis la konstruan taskon de kiloaranĝo ĝis ŝiplanĉo nur en la daŭro de 39 tagoj. En la konstruado, plene mobilizante la amason kaj energie sin okupante pri renovigo kaj revolucio en tekniko laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ŝipkonstruaj laboristoj multe altigis la laborefikecon kaj reduktis la konstruan periodon de la ŝipkorpo. En la pasinteco la de laboristoj elmetitaj proponoj anstataŭigi la plat-ŝablonan muntilon per cementa platformo estis rifuzitaj de la burĝaraj reakciaj teknikaj "aŭtoritatoj". Nun la laboristoj kuraĝe alprenis tiun ĉi novan teknikan procedon kaj rikoltis sukceson, kaj per tio ili ne nur efektivigis gravan teknikan renovigon, sed ankaŭ ŝparis por la ŝtato pli ol 180 tunojn da ŝtala materialo. Kun la sentima revolucia spirito la laboristoj sukcesigis post ripetada eksperimento

*Dekmiltonela oceana ŝipo "Gao Yang"*



la novan teknikon pri prufosta kaj poŭpfosta veldado, kiun la reakciaj teknikaj "aŭtoritatoj" eĉ ne kuraĝis pripensi en la pasinteco, kaj per tio ili multe altigis la laborefikecon kaj la kvaliton de la ŝipo.

Kun ruĝa koro de senlima fideleco al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ la laboristoj batalis tage kaj nokte en penigaj kondiĉoj dum la konstruado de tiu ĉi oceana ŝipo. Iuj bataladis senripoze dum pli ol dudek sinsekvaj horoj sub alta temperaturo. Ili rigardis ĉiun pluan guton de ŝvitado kaj ĉiun pluan veldstangeton kiel konkretan esprimon de sia fideleco al Prezidanto Maŭ. Kiam la grandaj flankaj platoj estis instalataj, ekfuriozis 7-klasa ventego. Rompinte la fremdlandan rutinon malpermesi ekfunkciigi arganon en ventego super 6-klasa, la arganlaboristoj kun riĉa sperto konkeris multajn malfacilojn kaj finfine sukcesis akurate transigi la pezajn ŝtalplatojn al la ĝustaj lokoj sur la ŝipkorpo en la 7-klasa ventego. En la fina stadio de la poŭpfosta veldado, subite aperis ĉe veldata loko fluidigita metalo kiu estis inkandeska je ĉirkaŭ mil gradoj, en kelkaj sekundoj abrupte falis el la junto de loko pli ol du metrojn alta. En tiu kriza momento, firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon"**, veterana laboristo Lin Gjunŝeng ekprenis asbestpulvoron kaj kuris brave al la fajrejo. La metalo brulvundis liajn brakojn, la alta varmego bruligis lian veston, kaj sur lia haŭto aperis sangvezikoj pro brulego, sed li persistis en la batalo garantiante la glatan iradon de la laboro. Ĝuste kun tia ruĝa koro de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ la laboristoj akcelis la konstruadon de la korpo de tiu ĉi 10,000-tonela oceana ŝipo per plej alta rapideco kaj laŭ postulo de alta kvalito.

Post publikigo de la komuniko de la Plivastigita Dekdua Plena Sesio de la Oka Centra Komitato de la Partio, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj, kiuj sin okupis pri konstruado de tiu ĉi oceana ŝipo, estas multe kuraĝigitaj. Ili solene ĵuris, ke ili firme respondos la grandan batalan alvokon de la Plena Sesio kaj certe plenumos la grandan historian taskon komisiitan de Prezidanto Maŭ. Post luktado en tagoj kaj noktoj ili fine antaŭplenumis ĉiujn preparajn laborojn antaŭ la surakvigo de la ŝipo. Sub kuraĝigo de la komuniko de la Plena Sesio la vastaj laboristaj amasoj de la ŝipkonstruejo decidis batali por nova venko kaj per tio fari omaĝon al la venonta Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio.

## KURANTAJ AFEROJ

### GRANDKVANTE PRODUKTI MEDIKAMENTOJN OFTE BEZONATAJN DE LA KAMPARO

Gvidate de la granda instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"**, la revoluciaj laboristoj de la Pekina Medikamenta Fabriko sendis por esplori la bezonon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al medikamentoj, akre kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion efektivigitan de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en kuraca kaj higiena laboro, pene produktas pli multe kaj pli bone medikamentojn bezonatajn de la kamparo en favoro al la "nudpiedaj kuracistoj" kaj en servo al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

### KURACAJ KAJ HIGIENAJ LABORANTOJ VENAS EN LA KAMPARON FIKSLOĜADI

Serioze efektivigante la grandan instrukcion de Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"**, la vastaj amasoj de kuracaj kaj higienaj laborantoj de nia Hejlonggiang-provinco iris unuj post aliaj al la kamparo por fiksloĝadi tie. Jam pli ol 8,400 kuracaj kaj higienaj laborantoj, inkluzive diplomitojn el altaj kaj mezgradaj medicinaj lernejoj kaj disĉiplojn de la ĉina medicino finlernintajn en la lastaj du jaroj, iris al la kamparo por fiksloĝadi tie, kaj tiamaniere estis plifortigita la kuraca kaj higiena laborantaro en la kamparo.

### "VASTA HORIZONTO" PREZENTATA EN NIA LANDO

Por celebri la 24-an datrevenon de la liberiĝo de Albanio, la albana rakonta filmo *Vasta Horizonto* estas sinsekve prezentata ekde novembro, 1968 en Pekino kaj aliaj grandaj urboj de Ĉinio.


La filmo *Vasta Horizonto* estas verkita laŭ la heroa historio de la albana komunisma batalanto Adem Reka. Tiu ĉi filmo sukcese prezentas al ni la gvidan rolon ludatan de la laborista klaso de heroa Albanio staranta sur la eŭropa kontraŭimperiisma kaj kontraŭreviziisma plejfronto, en la vigle disvolviĝanta revoluciiga movado sub la gvido de la Albana Partio de Laboro kun la granda marksist-leninisto kamarado Enver Hoxha kiel la estro.

# Bormaŝino por Profunda Naftoputo Sukcese Fabrikita en Ĉinio

HINFA

LA vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj de la Lanĝoŭ-a Fabriko de Petrolaj kaj Kemiindustriaj Ekipaĵoj de Gansu-provinco de nia lando kune kun la vastaj amasoj de laboristoj kaj revoluciaj teknikistoj de dekoj da kunlaborantaj fabrikoj tra la tuta lando mem projektis kaj fabrikis la unuan bormaŝinon de Ĉinio por profunda naftoputo kun monda progresinta nivelo kaj ĝi faris sukcesan provboradon sur petrolkampo. La borita profundeco superis la maksimuman profundecon laŭprojektan kaj nun la maŝino estas boranta al pli profunda naftotavolo.

En la jaro 1965, nia lando komencis projekti la unuan bormaŝinon por profunda puto. En la granda proletara kultura revolucio, per la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong kiel armilo la vastaj amasoj de revoluciaj oficistoj kaj laboristoj bojkotis kaj kritikis la sklavismon al fremdlando kaj rampismon de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, frakasis ĉiajn ĉikanojn kaj malhelpojn fare de la plenmano da potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatoj" kaj elfaris la bormaŝinon por profunda naftoputo en nur iom pli ol duonjaro. Tiu ĉi granda atingo pruvas, ke nia lando jam povas fari tutan kompleton de mekanikaj ekipaĵoj por borado de malprofundaj ĝis profundaj naftoputoj, montras ke la industrio de petrola mekaniko altiĝis ĝis tute nova nivelo. Tio havas tre gravan signifon por nia lando en plia efektivigo de la orientilo de Prezidanto Maŭ pri sinapogo sur la propraj fortoj kaj pli multa, pli rapida, pli bona kaj pli ekonomia disvolvado de nia petrola industrio.



*Estas sukcese konstruita kaj provita la unua bormaŝino por profunda petrolputo en nia lando kun internacia progresinta nivelo.*

Tiu ĉi bormaŝino por profunda naftoputo estas projektita kaj farita laŭ la efektiva bezono de nia lando por ekspluati petrolkampojn. La totala pezo de la maŝino estas ĉirkaŭ 300 tunoj. Ĝi estas funkciigata per dizeloj kun totala potenco de 3,000 ĉevalpovoj. La unuopaj partoj de la maŝino estas relative malpezaj, facile transporteblaj kaj konvenas al minejoj en la montozaj kaj riverozaj minregionoj. Tiu ĉi maŝino estas alte mekanikigita kaj aŭtomatigita, kun bonaj teknikaj kvalitoj. Ĝi provizas favorajn kondiĉojn por pli rapide, pli multe kaj pli bone bori putojn. Kaj krome, ĝi povas redukti la pezajn fizikajn laborojn de la putoboristoj kaj sekurigi la produktadon.




*"Vivu la venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ! Vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!"* Aklamas la tuta kuraca personaro de la higiena sekcio.

# Miraklo en la Medicina Historio


HONGVEJ


La higiena sekcio de iu el la pekinaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo sukcese fortranĉis el la ventro de komunumanino Ĝang Kiugju grandan tumoron pezantan 45 kilogramojn kaj per tio skribis brilan paĝon en la medicina historio. La novaĵo rapide disvastiĝis tra la tuta lando, kaj ĉiuj laŭdas tion kiel novan triumfon de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La 21-an de februaro 1968, fervoja laboristo Cuj Bingvu persone portis sian edzinon Ĝang Kiugju per puŝĉaro al la higiena sekcio de iu el la pekinaj trupoj. Ŝi estas komunumanino malsupera mezkamparanino de Langcun-brigado de Guocun-komunumo en Manĉeng-gubernio, Hebej-provinco. Tieaj kuracistoj tuj faris ekzamenojn por ŝi, vidante ŝin malfacile anhelanta kun ventro tiel



*La komandantoj kaj batalantoj de la tuta kazerno konkure petas permeson por oferi sian sangon al Ĝang Kiugju. Ili transfuzis sume 7520 mililitrojn da sango al ŝi dum la operacio, kaj tiu kvanto multe superis la sangon en ŝia korpo.*

granda kiel kaldrono. Kvankam ŝi estis pala kaj malgrasa, tamen ŝia korpa pezo atingis 96 kilogramojn, ĉar granda tumoro plenigis ŝian tutan abdomenon kaj duonon de la brusto. La armeaj kuracistoj havis elkoran simpation por tiu klasa fratino.

"Kial vi kondukas ŝin por kuraco, nur kiam la malsano jam atingis tian gradon?"

Kun doloro Cuj Bingvu ekrakontis la historion.

En 1964, kiam Ĝang Kiugju trovis tumoron en la ventro, ŝi jam turnis sin al pluraj grandaj hospitaloj por ekzameno, sed la tieaj "specialistoj" kaj "eminentaj" kuracistoj konkludis ke la malsano estas "nekuracebla" kaj "ne valoras kuracadon", kaj tiel ŝi estis forpuŝita el la hospitaloj. La tumoro komence granda kiel bovlo nun kreskis ĝis la grandeco de kaldrono. Ĝang Kiugju tute perdis la kapablon mem zorgi pri sia ĉiutaga vivado. Ŝi povis nek stari, nek sidi aŭ kuŝi; ŝi vivis nur genuante sur masonita lito dum la tuta tempo. Tiam Cuj Bingvu diris al la kuracistoj:

"Mi nun turnas min ne al tekniko kaj ekipaĵoj, sed al la Liberiga Armeo fidela al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Kaj mi kredas ke vi certe resanigos ŝin."

Tion aŭskultinte, la kamaradoj de la higiena sekcio tuj petis lin reiri hejmen kun sia edzino por fari necesajn enhospitaliĝajn preparojn por ŝi, promesante poste aranĝi por ŝin venigi.

Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"La demando 'por kiu' estas demando fundamenta, demando principa."** Servi al la amaso aŭ servi al la burĝaro — jen estas serioza batalo inter la du linioj en higiena laboro. La kamaradoj de la higiena sekcio diris: La kontraŭrevolucia reviziisma linio efektivigata de Liu Ŝaŭki sur la kuraca kaj higiena fronto puŝas vivantojn al tombo, sub la brilo de la revolucia

linio de Prezidanto Maŭ ni nepre savos Ĝang Kiugju el agonio. La partia filio tuj raportis la aferon al la partia komitato de la trupo. La lasta donis kategorian instrukcion: "Kvankam nia higiena sekcio estas malgranda, tamen nia pordo devas esti larĝe malfermita al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Decideme resanigu Ĝang Kiugju per la kora fideleco al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ por doni fortan baton al la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝata de Liu Ŝaŭki sur la kuraca kaj higiena fronto."

La 25-an de februaro, kun kora fideleco al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj profunda klasa sento al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la kamaradoj de la higiena sekcio veturigis Ĝang Kiugju per aŭtomobilo al sia malsanulejo.

Same kiel klopodi en batalo por detale kaj plene informiĝi pri la stato de la malamiko antaŭ atako, ili faris pli ol 30 diversajn plenampleksajn kaj ripetadajn ekzamenojn pri la stato de la malsano de Ĝang Kiugju, kaj farinte seriozajn, sciencajn kaj dialektikajn analizojn ili fine venis al konkludo ke "la tumoro estas benigna!" La erara konkludo de la grandaj hospitaloj estis renversita.

Por fortranĉi la grandan tumoron en la korpo de Ĝang Kiugju, la partia filio kaj la kamaradoj de la higiena sekcio faris profundajn esplorojn kaj prezentis centojn da problemoj, inter kiuj multaj estis malfacilaj kaj neniam renkontitaj. Kion fari?

**"La amaso estas vera heroo."** La partia filio postulis ĉiujn gajni la venkon per la kora fideleco al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La tuta sekcio do organizis sin en ok batalajn grupojn, inkluzive tiujn de politika direktado, operacio kaj narkotado. En oficejoj, dormejoj, kuirejo . . .,



*Kamaradino Ĝang Kiugju gaje interŝanĝas siajn komprenaĵojn en kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong kun kamaradoj de la "Pionira Higiena Sekcio Tutkore kaj Tutanime Servanta al la Popolo".*

ĉiuj klopodis kontribui per sia saĝo kaj forto por konkeri tiujn malfacilajn problemojn.

Alproksimiĝis la dato fiksita por la operacio. Al ĉiuj problemoj oni jam trovis ĝustajn solvojn, sed ne solvita estis la demando pri entranĉejo. Kiel oni entranĉu por kiel eble plej malmulte vundi la histojn de la abdomeno de la pacientino kaj elpreni plene la tumoron? La kuracistoj kaj flegistoj tagnokte faris strekojn ĉirkaŭ ventromodelo farita el lagenario; kuiristoj tion faris sur fajenca pelvo, kaj eĉ pacientoj klopodis sur siaj kapkusenoj. Iu higienisto ne dormis dum tri sinsekvaj noktoj kaj sukcesis fari planon pri entranĉejo kompare idealan. Tiuj batalantoj senlime fidelaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ tiel serioze cerbumadis, forgesante manĝon kaj dormon dum pli ol 20 tagnoktoj, kaj fine estis ellaborita operacia projekto, en kiun kristaliĝis la tuta animo de multaj revoluciaj batalantoj.

Matene je 30 m. post la 7-a horo en la 23-a de marto, ĉiuj kuracistoj kaj flegistoj de la sekcio ĵuris solene al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, vizaĝe al la leviĝanta suno: Ni nepre sekvante vian instruon **"Savi mortantojn kaj helpi vunditojn, efektivigi revolucian humanismon!"** decideme elprenos la tumoron de Ĝang Kiugju por ebligi al ŝi feliĉe vivi kaj ĝoje labori en la granda epoko de Maŭ Zedong!

Sur la muroj de la operacia ĉambro pendis portretoj kaj vortoj de Prezidanto Maŭ.

La pacientino estis portita en la ĉambron. Antaŭ ol veni al la higiena sekcio, ŝi jam senesperiĝis pri sia resaniĝo. Post sia alveno ŝi starigis sian fidon pri batalo kontraŭ la malsano dank' al kreiva studo kaj kreiva apliko de la penso de Maŭ Zedong sub la helpo de kamaradoj de la higiena sekcio. Nun ŝi recitis la vortojn de Prezidanto Maŭ **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon"** kaj kuŝis trankvile sur la operacia stablo.

Komenciĝis la operacio. Ĝuste kiel atendite aperis sinsekve danĝeraj statoj. La ĉeestantaj estroj de la trupo tuj kuraĝigis la kamaradojn per la instruo de Prezidanto Maŭ **"Tio, kion ni bezonas, estas entuziasma sed trankvila spiritstato kaj intensa sed bonordema laboro"**, tiel ke la kaŭzoj estis rapide trovitaj kaj glata irado de la operacio estis garantiita.

La tumoro estis malkovrita. Ĝia surfaco estis plene kovrita per retformaj arterioj alგluiĝintaj al ĉirkaŭaj histoj. La kvin membroj de la operacia grupo ĉiuj kun plej granda atentemo malkunigis iom post iom la intergluiĝintajn partojn nek per tondiloj nek per tranĉiloj sed per gazbuletoj tenataj per pinĉiletoj. En ĉiujn etajn movojn enverŝiĝis ilia senlima fideleco al Prezidanto Maŭ kaj senlima amo al la popolamasoj. Ĝuste kiam ili verŝis sian tutan atenton al sia laborado, subite malaltiĝis la sangpremo de la pacientino. La armeaj kuracistoj kiuj zorgis pri transfuzado rapide ekagis por levi la sangpremon. Multaj boteloj da sango estis transfuzitaj unu post alia, tiel ke baldaŭ elĉerpiĝos la preparitaj 5,000 mililitroj. La kadroj kaj batalantoj, kiuj atendis ekster la operacia ĉambro por oferi sian sangon al la klasa fratino, tuj konkure proponis oferi la sian. La sango de 38 klasaj fratoj estis transfuzita en la vejnon de Ĝang Kiugju, kaj ŝia sangpremo tuj normaliĝis.

La algluaĵoj ĉirkaŭ la tumoro estis plene apartigitaj, kaj fine montriĝis ĝia baza parto. Du ĉefaj grandaj arterioj pasas tra la baza parto de la tumoro. Se ili estas rompitaj, la sango en la tuta korpo tuj plene elfluos en palpebruma daŭro. En tiu plej kriza momento, momento ankaŭ por la fina venko, firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"Kio vere gravas en la mondo estas la vorto 'seriozeco', kaj la Komunista Partio plej taksas 'seriozecon'"** kaj kun spirito revolucii **"ekskluzive"** kaj **"senrezerve"**, ili konkeris ĉiujn malfacilojn kaj danĝerojn kaj fine elprenis la kolosan tumoron 45 kilogramojn pezan el la korpo de Ĝang Kiugju je 30 m. post la 19-a horo.

Kiam la ĝojiga informo pri la sukceso de la operacio venis el la operacia ĉambro, la kadroj kaj batalantoj, kiuj maltrankvile atendis ekstere jam 12 horojn, ĉiuj saltis de ĝojo. La tuta kazerno kaj ĉirkaŭaĵo ekskuiĝis de la vivuado: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Vivu la venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!"

Je la unua horo en la sekvinta tago, rekonsciiĝis Ĝang Kiugju. Kiam ŝi ekpalpis la malŝvelintan ventron, ŝiaj vangoj estis tuj superverŝitaj de varmaj larmoj. Rigardante la portreton de Prezidanto Maŭ, ŝi kriis kun emocio: "Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!"

La sesan tagon post la operacio, estis komencita malkudro de fadenoj laŭ la tranĉlinioj longaj je 95 cm. inkluzive la branĉan tranĉlinion. En la oka tago, ŝi jam povis iom moviĝi fore de la lito. Kaj nun ŝi jam ĝoje partoprenas laboron. Ŝi diradas al aliaj kun senlima dankemo al la granda gvidanto: "Estas Prezidanto Maŭ nia amata, kiu donis al mi la duan vivon!"



*Revolucia Moderna Pekina Opero*

# Ruĝa Signal-lanterno

Kolektive adaptita de la Ĉina Pekinopera Trupo

## SCENO 4

### PERFIDO DE VANG LIANGJU

Posttagmeze de la sekvanta tago.

Oficĉambro de Hatojama. Sur lia skribotablo estas medalo kaj telefono. Apud la tablo staras ekrano.

Kiam la kurteno leviĝas en muziko, la scenejon regas tomba silento, pro kio la ejo spiras frostan terurigon.

Envenas Hoŭ Hianpu kun dosiero pri Vang Liangju.

**Hoŭ:** *Saltint' el trajno krake pafis,*
*Sinjoron Vang je l' brako trafis,*
*La vundo estas ja malgrava,*
*Sed lin laŭdegis Hatojama —*
*Jen ago certe kaŭzo-hava.*

La telefono sonoras. Hoŭ prenas la ricevilon.

**Hoŭ:** Halo, kiu parolas? (*Li ekprenas pozon de atento.*) Jes! Iom atendu. (*Li demetas la ricevilon.*) Telefono vokas vin, sinjoro grupestro.

Envenas Hatojama de post la ekrano.

**Hatojama:** Kiu vokas?

**Hoŭ:** La komandejo.

**Hatojama:** Tion vi devis diri al mi. (*Li prenas la ricevilon.*) Halo, Hatojama parolas. Kio? Rompita? Eh! (*Li ridas.*) Ne maltrankviliĝu, sinjoro. La ĉifrolibron mi certe akiros. Kio? Ordono de la Plej Alta Komandejo de Guandong-Armeo! (*Li prenas pozon de atento.*) Solvi la kazon en limigita tempo . . . Jes! Jes! Jes! (*Demetinte la ricevilon li murmuras al si mem.*) Hm, terure ruzaj estas la komunistoj! La plej alta komandejo apenaŭ trovis ilian malklaran spuron en la norda Manĉurio, sed ili tuj sin forkaŝis de ĝi. Terure ruzaj estas la komunistoj.



**Hoŭ:** Jen estas la dosiero pri Vang Liangju. (*Ĝin prezentas.*)

Hatojama transprenas ĝin kaj iom foliumas.

**Kaporalo** (*interne*): Raporton!

Hatojama mansignas.

**Hoŭ:** Envenu!

Envenas la kaporalo.

**Hatojama:** Ĉu vi trovis lin?

**Kaporalo:** Ni traserĉis ĉiujn hotelojn, banejojn, teatrojn kaj vetludejojn, sed ne trovis la saltinton el la trajno. Ni arestis kelkajn suspektindulojn. Ĉu via grupestra moŝto volas ilin esplordemandi?

**Hatojama:** Por kio utilas la arestitaj suspektinduloj? La kazo estas eksterordinare grava. La plej alta komandejo ĵus ordonis, ke la saltinto el la trajno estas kuriero de la KPĈ-organizaĵo en la norda Manĉurio. Li kunportas kun si tre gravan ĉifrolibron —

**Hoŭ** kaj **Kaporalo** (*prenante pozon de atento samtempe*): Jes!

Poste, je ĉiu frazo de Hatojama, Hoŭ kaj la kaporalo ripetas la saman moviĝon kaj jesas.

**Hatojama:** La ĉifrolibro estas sendata al la Gerila Taĉmento de la Norda Montaro, kiu atendas ĝin por interligiĝo. Se la ĉifrolibro atingos la gerilan taĉmenton kun miloj da homoj, do tiu ĉi, kiel tigro kun aldonitaj flugiloj, fariĝos ege malutila al nia imperio!

**Hoŭ** kaj **Kaporalo:** Jes, jes, ege malutila!

**Hatojama:** Kiel vi povis lasi tian gravan komuniston forgliti sub viaj okuloj?

La kaporalo kaj Hoŭ rigardas silente unu al la alia.

**Hatojama:** Sentaŭguloj!

**Hoŭ** kaj **Kaporalo:** Jes...

**Hatojama:** Kiel pri patrolestro Vang?

**Hoŭ:** Li estas vundita je la brako, sed la ostoj ne...

**Hatojama:** Tion mi ne demandis. Diru al mi lian devenon.

**Hoŭ:** Bone. Lia nomo estas Vang Honggâng, lia alinomo Vang Liangju. Lia avo estis opiovendisto, lia patro — trinkejomastro, kaj li mem estis unu el la unuaj diplomitoj el la Polica Lernejo de Manĉuria Imperio. Li havas edzinon, filon kaj patron.

**Hatojama:** Nu, do li venas el bona familio. Ja grandan oferon li faris ĉifoje. Tre bone! Envoku lin.

**Hoŭ:** Jes. (*Vokas.*) Patrolestro Vang!

Interne: "Patrolestro Vang!" Envenas Vang kun unu brako en skarpo.

**Vang** (*salutante*): Via grupestra moŝto!

**Hatojama:** Ho, junulo!

*Junulo brava, vi amaron spertis,*
*Per via korpo vi mortspite malamikan kuglon baris.*
*Kun sentimeco vi defendis la edenon imperian.*
*Mi donas al vi jen medalon triaklasan en la nomo de l' plej alta komandejo.*

**Vang** (*surprizite kaj salutante*):

*Jen fatalaĵon tamen sekvas ĝoja feliĉigo,*
*Ja Hatojama ne suspektis pri la artifiko.*
*Mil dankojn al vi, via moŝto, pro la korfavoro,*
*Elkoran dankon pro ricevo de l' medal-honoro.*

**Hatojama:** Junulo!

*Se vi lojale pene servos al la imperi',*
*Vin rekompencos salta promoci'*
*Proverbo diras: Fronte mar' maldolĉa sin etendas,*
*Returne bord' atendas.*
*Elekton saĝan faru laŭ raci'!*

**Vang:** Mi ne komprenas vin, via grupestra moŝto.

**Hatojama:** Hm! Vi devas kompreni. Vi ja ne estas aktoro, sed kial vi aktoras antaŭ mi?

**Vang:** Aktoras?

**Hatojama:** Jes, vi aktoras, sed bedaŭrinde kun malalta arto, kaj mi povas nur mallaŭdi vian prezentadon.

**Vang:** Via grupestra moŝto...

**Hatojama:** Vi eble ankoraŭ ne konas mian karieron? Lasu min diri al vi: Kiam vi estis ankoraŭ suĉanta mamon, mi jam estis fama ĥirurgo. Kvankam vi pafis trafe, tamen vi forgesis ja, kiel la saltinto el la trajno povas pafi nur tri centimetrojn for de vi?

**Vang:** Tre bedaŭrinde, ke vi tiel opinias, via grupestra moŝto!

**Hatojama:** He, he, he,... Ja tre bedaŭrinde. Estas bedaŭrinde ke mi, maljunulo, ne trompiĝis de via artifiko! Ho, junulo, ĉu vi volas ĉikani min per la problemo kiom estas unu plus unu? Ne, ne! Frato, tuj diru la veron. Kiu estas via komplico? Nu?!

**Vang:** Komplico? ...

**Hatojama:** Jes. Ĉu la vorto mirigas vin? Estas tute evidente, ke tiu saltinto el la trajno estis grave vundita. Se neniu komplico helpus lin kaj ŝirmus lin eskapi, ĉu li povus malaperi per flugiloj?

**Vang:** Via grupestra moŝto! Vi povas enketi la realon. Tiam mi estis vundita kaj falis teren. Kiel mi povus scii, kiel la saltinto forfuĝis?

**Hatojama:** Kompreneble vi scias, kaj vi devas tion scii. Se vi ne scius, kial vi pafis al vi mem? Hm, hm! Ne ludu vian "saĝon", junulo. Tuj diru al mi la veron. Kiu estas la subtera kompartiano? Kiu estas via komplico? Kie la kuriero sin kaŝas? Kiu la ĉifrolibron tenas nun? Diru pri ĉio! Da medaloj kaj premioj ĉe mi estas multe kaj multe!

**Vang:** Vi kirlas mian cerbon, via grupestra moŝto.

**Hatojama:** Hm, hm... En tiu kazo mi devas vin malebriigi. Bone — Hoŭ Hianpu!

**Hoŭ:** Jes!

**Hatojama:** Helpu tiun ĉi junulon sin malebriigi.

**Hoŭ:** Jes. Gardistoj!

Du japanaj ĝendarmoj envenas.

**Vang:** Mi estas senkulpa, via grupestra moŝto, senkulpa.

**Hatojama:** Batu!

La du ĝendarmoj eltrenas Vang, kaj ilin sekvas Hoŭ.

**Hatojama** (*malice ekridas rigardante la dorson de Vang Liangju*): Hm...

*La valon de Songhua-river' tratretas ferĉevaloj,*
(*Aŭdiĝas batbruoj kaj krioj post la kulisoj.*)
*Kranioj homaj servas al ni kiel vin-pokaloj.*
(*Denove aŭdiĝas batbruoj kaj krioj post la kulisoj.*)
*Jen ĉiu krako de vipfrap' produktas ploro-krion,*
*Kaj ost-krakiloj, tenden-kordoj belan simfonion.*
*Li ludu, spite al doloro, rolon de bravulo...*
*Mi ja lin kapitulacigos krude per torturo.*

Envenas Hoŭ Hianpu.


**Hoŭ:** Li jam konfesis, via grupestra moŝto!

**Hatojama:** Kiu estas lia komplico?

**Hoŭ:** Li Juhe, la komutisto de la komutejo n-ro 51.

**Hatojama:** Li Juhe! (*Li demetas siajn okulvitrojn.*) Hm, hm...

**— La kurteno falas.**



*Membroj de iu agrikultura kooperativo en la regiono Durres de Albanio ĝoje rikoltas novan grenon.*

# Nova Etoso en la Lando de Agloj

ĈE la talio de la ĉielskrapanta montĉeno Gjalica en la regiono Dibra de Albanio etendas kanalo longa je 44 km., kiu kvazaŭ flirtanta arĝenta rubando sin sternas de sudo al nordo. Ĝi estas la fame konata kanalo Lur-Seta-Cidhen-Rec elhakita tute per homfortoj sub ekstreme malfacilaj geografiaj kondiĉoj. Ĝi irigacias 1,200 hektarojn da seka tero. Ĝi estas simbolo de revolucia heroismo de la popolo de la lando de agloj en la brava batalo kontraŭ la naturo.

Jam en la jaro 1952, ĉi-tieaj popolanoj faris provon por elhaki kanalon sur la krutaj rokoj.

La rezolucio kun historia signifo aprobita de la Kvina Kongreso de la Albana Partio de Laboro okazigita en novembro 1966 kaj la grava parolado de kamarado Hoxha farita en la 6-a de februaro 1967 pri *Plua Revoluciigo de la Partio kaj Regpotenco* vekis grandan revolucian energion de la popolanoj de tiu montregiono. Ili faris heroan ĵuron marŝi al virgaj montoj kaj devigi la teron doni grenon. En printempo de 1967, sub la intima zorgo de la Partio de Laboro kaj la rekta subteno de la registaro ili komencis la batalon per kolektiva forto trahaki la grandiozan kanalon Lur-Seta-Cidhen-Rec.

Miloj da agrikulturaj kooperativanoj konkure partoprenis la konstruon de tiu kanalo. Fininte sian tagan laboron sur kampoj, multaj kooperati-

vanoj venis nokte al la montoj por haki la kanalon. Tie centoj da eksplodistoj batalis ŝultro-ĉe-ŝultre kun ili. Sur la konstruejo estis neniu mekanika ekipaĵo, krom marteloj, boriloj, ŝoveliloj kaj dinamito, kiujn ili uzis en la batalo kontraŭ la krutaj rokoj. Sub tieaj simplaj kaj primitivaj kondiĉoj ili fabrikis kaj riparis mem ilojn en kavernoj.

Lur-lago estas la fonto de la kanalo, kies akvo devas flui tra roka krutaĵo longa je 15 km.; en kelkaj partoj la rokmuro transpasas eĉ 90 gradojn; parto de la kanalo kun longeco de pli ol 800 m. devas preni la formon de tunelo. Tio portis al la konstruado grandajn malfacilojn.


La vastaj amasoj de laboristoj kaj kooperativanoj partoprenantaj la konstruadon disvolvis la altan revolucian spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi. En kolektiva klopodo ili manifestis siajn grandajn kreivajn saĝon kaj talenton. Laŭ la konkretaj kondiĉoj sur la konstruejo kaj aplikante siajn spertojn akumulitajn en la longdaŭra produkta batalo, ili kuraĝe reviziis la originan projekton de la inĝenieraj kaj teknikaj laborantoj, kaj tiel multe rapidigis la konstruon de la tunelo. "Alkonduki pli da akvo signifas rikolti pli da greno", kaj la konstruantoj proponis plilongigi la projektitan kanalon ĝis 44 km., t.e. ĝis pli ol duoblo.

Trapasinte tagojn kaj noktojn plenajn je heroismo kaj konkerinte sennombrajn malfacilojn kaj danĝerojn, la laboristoj kaj kooperativanoj plenumis nur en malpli ol jarduono la unuan parton de la konstruaj taskoj en aŭgusto 1967, du jarojn antaŭ la projektita dato. Ankaŭ la dua parto de la konstruaj taskoj estis antaŭdate plenumita en julio 1968.

Kian ĝojegon kaj feliĉon la klara kaj dolĉa akvo de la kanalo portas al la montregionaj popolanoj loĝantaj laŭ la kanalo! Ĝi ne nur irigacias la sekan teron de la monta regiono, sed ankaŭ vekis senkompare varman amon de tieaj popolanoj al la Partio kaj al sia gvidanto. Kun emocio venis al la kanalo centjara blinda maljunulo Baŝa apogite de sia filo. Tenante freŝan akvon per ambaŭ manoj li diris: "La Partio povas gvidi nin krei ĉion, se ne estus la gvido de la Partio kaj Enver, eĉ en sonĝo ni ne supozus elhaki tian kanalon! Realiĝis nun la idealo de la montregionaj popolanoj!" Kooperativanoj diris: "La Partio donis akvon al la tero, kaj grenon kaj feliĉon al la popolo. Pro tio ni estas ĉiam pretaj oferi nian vivon por la Partio kaj la socialisma afero."

La heroa albana popolo estas brave batalanta por krei pli belan kaj pli feliĉan estontecon!

*Membroj de agrikultura kooperativo en la regiono Dibra de Albanio hakas monton por konstrui kanalon.*



# Sovetuniaj Laboristoj en Tragedio

En fabrikoj, minejoj kaj aliaj industriaj entreprenoj, la sovetunia reviziisma renegata kliko praktikas kruelan burĝaran diktaturon super la vastaj amasoj de laboristoj, kaj multaj laboristoj estas senigitaj de la sovetunia reviziisma privilegia tavolo eĉ je la plej fundamenta rajto de laboro.

## LABORISTINO ABSURDE MALDUNGITA

Lastatempe, gazeto de sovetunia reviziismo malkaŝis, kiel laboristino Ŝuru Kerimbekova estas absurde maldungita. Tio estas nur unu el la tragedioj trafitaj de multaj sovetuniaj laboristoj.

En iu frua mateno antaŭnelonge, laboristino Ŝuru Kerimbekova de Kalinin-Sukerkombinato kiel kutime iris al laboro. Ŝi laboris en tiu ĉi fabriko jam 25 jarojn. La arboj propramane plantitaj de ŝi apudvoje ĉe la fabriko jam kreskas fortikaj kaj foliriĉaj.

Atinginte la pordegon de la fabriko, ŝi kutime kapsalutis la gardiston kaj poste iris al la enirejo. Sed ŝi estis haltigita ĉe la pordo. La inĝeniero respondecanta pri fikskvotaj laboroj laŭ la peto de la departemento pri kadroj diris al ŝi tra telefono: "Vi estas maldungita. Iru rigardi la ordonon. Ĝi pendas ĉe la administracio."

"Maldungita? Pro kio?"

Ŝuru mordis la lipon. Memoroj pri la pasintaj 25 jaroj bolis en ŝia cerbo. Ŝi iris sian tutan laboran vojon en tiu ĉi fabriko, ekde la tagoj kiam ŝi eniris en la fabrikon kiel konstruistino en konstruado de la fabrikaj domoj ĝis hieraŭ. Ŝi estis honore menciita, kiam ŝi laboris kiel mekanikistino kaj motorciklistino. Kaj ĝuste ĉi tie, sur la laborposteno ŝi fariĝis invalido duagrada. Lastatempe, pro malsano ŝi estis transigita al okupiĝo pri diversaj bagatelaj laboroj. Hodiaŭ ŝia nomo estas senkaŭze forigita el la personara listo de la fabriko, eĉ sen antaŭsciigo.

La "eksigita" laboristino iris rigardi la ordonon. La ordono subskribita de la fabrikestro Galkin legiĝis jene: "Por altigo de la laborproduktiveco kaj evito de superelspezo en salajra fonduso, eksigitaj estu jenaj kamaradoj: . . ."

Kerimbekova provis fari interparolon kun la gvidantaro. Ŝi iris al la vicĉefinĝeniero kaj poste al la ĉefinĝeniero. Sed neniu volis paroli kun ŝi.

Ŝi plendis al la sindikata komitato de la laborejo. Kaj tiu ĉi diris: "Pli bone estas turni vin al la fabrika komitato." Sed la prezidanto de la fabrika komitato, kiu laŭdire reprezentas interesojn de la laboristaj amasoj, diris al ŝi, ke la fabrika komitato plene konsentas pri la decido de la administracio. Estante senhelpa, Kerimbekova provis iri aliloken por justa solvo.

Sed kie ŝi povis trovi justecon, kiam la potenco estas en la manoj de la sovetunia reviziisma privilegia tavolo? Antaŭ ol la krima regado de la sovetunia reviziisma renegata kliko estos renversita, la sovetunia laborista klaso ne povas havigi al si ian pozicion, kaj nenie troviĝas justeco por ĝin protekti.

## TERURAJ TURMENTOJ AL INFAN-LABORISTOJ

La Ruĝpoljanska Panbakejo de Moskva Regiono dungis pli ol 30 infan-laboristojn en somero de 1968. Ili ĉiuj estis sub la aĝo de 16 jaroj.

Kiam ili eniris la fabrikon, la ĉeflaboristo tuj ordonis al ili: "Morgaŭ vi laboru en nokta deĵoro."

Labori nokte estis multe pli penige ol labori tage. Estis somero, la infanoj longe laboradis ĉe ruĝe varmigita fornego kaj sentis, ke eĉ spiradi estas malfacile por ili. La varmegaj panformiloj brulvunde estigis vezikojn sur ilia haŭto. La povraj infanoj tro laciĝis tra la tuta nokto sub tiaj malbonaj kondiĉoj kaj ruĝiĝis iliaj okuloj.

En la unua tago, Zavolokin jam difektis siajn pantalonon kaj ĉemizon. Kiam li balbute petis

pri bluzo, la direktoro diris kolere, ke al infan-laboristoj oni ne donas bluzon. Direktoro Tabaĉnikov sintenis tirane, krude kaj kruele, kaj arbitre ofendegis la laboristojn kaj pli ofte laŭte riproĉis la infan-laboristojn.

La vastaj laboristaj amasoj de la fabriko tre indignis pri la turmentado fare de la direktoro k.s. kontraŭ la infan-laboristoj. Juna elektrostablo-laboristo Borovikov kritikis la direktoron pro lia kruda sinteno kontraŭ la infan-laboristoj kaj pro malesto de speciala komitato por infan-laborista laboro en la fabriko. Sed kiu atendis, ke li estis maldungita pro tio. La direktoro furioze diris al li antaŭ la aliaj: "Vi, Borovikov, baldaŭ diplomiĝos el mezgrada teknika lernejo. Ni ne bezonas tiel altnivelan stablolaboriston, do vi serĉu laboron aliloke."

Sekve la Sindikata Komitato de la Fabriko tuj faris jenan rezolucion: "La fabrika komitato konsentas pri maldungo de la elektrostablolaboristo Borovikov. Ne estas ebleco uzi Borovikov en nia produktado, ĉar li estas altnivela specialisto."

Tio ankoraŭ ne estis ĉio. La fabriko elpensis multajn manierojn dekalkuli salajrojn de la infan-laboristoj. Foje, la infan-laboristoj rimarkis, ke sur iliaj laborkartoj, kiujn plenigas la ĉeflaboristo, estas registrite, ke ili laboras ĉiutage po 4 horoj.

La infanoj tre miris, ĉar ili ĉiam laboris tra la tuta nokto, kaj ĉiuj tion sciis. Kial la ĉeflaboristo kalkulis al ili salajron nur laŭ 4 horoj? Sed la infanoj ne kuraĝis fari kritikon, kaj ankaŭ la laboristoj ne kuraĝis tion fari. Ĉar ĉiuj sciis kio povas rezulti el tio. Ĉu la juna stablolaboristo Borovikov ne estis ekzemplo?

---

## Inter Ni

**Letero de Hispana Leganto G. A.**

Denove mi direktiĝas al vi por sciigi vin ke mi ricevis alian paketon kun la du numeroj de EPĈ korespondantaj al la monatoj Aprilo kaj Majo, per kio mi jam estas ricevinta plu aktualajn raportojn pri la aktuala stato kaj marŝo de la Popola Ĉinio kaj pri la entuziasmo kiun la penso de Maŭ Zedong vekas en la tuta popolo, kio estas la kaŭzo de arda laboro kaj okazigas grandajn progresojn en la sferoj de agrikulturo, industrio, arto, ktp.

Tre kore mi dankas vin pro viaj sendaĵoj kaj informoj. Ĉi tie ĉiuj, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, ĝojas ĉiufoje kiam alvenas unu el viaj sendaĵoj, kaj ni miras pro via bonega revuo tiel bone prezentata kaj ilustrata kaj tiom da informoj pri Ĉinio, Vjetnamio, ktp.

Multege plaĉus al ni ke ni povos havi kelkajn verkojn de Maŭ Zedong Esperant-lingve, por uzi ilin kiel ilon por lerni la internacian lingvon, kaj ĉefe la libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, Esperant-lingve kaj eĉ en la Hispana lingvo, tiel ke tiuj kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton povu legi tiun libreton kiu kondensas la penson de Maŭ Zedong.

**Letero de Aŭstria Leganto G. B.**

La sesa numero de via ĵurnalo tute speciale plaĉis al mi. Tiel multaj ĉarmaj, bone edukitaj kaj kreskigitaj infanoj kaj junuloj! Ne nur suno, pluvo kaj roso devus esti favoraj ĉe vi, certe helpas ankaŭ kelke da aliaj bonaj kondiĉoj. Mi volonte legus plu pri via popolnutrado kaj higienaj institucioj same kiel ankaŭ familiaj kutimoj.

**Letero de Okcident-germana Leganto J. K.**

Ĝoje mi legis vian okt-n-ron de EPĈ, precipe la aldonaĵon pri la invado al ĈSR. Tiun ĉi artikolon mi bone povos utiligi dum mia instruado! Kun la E-grupo mi kunvenas dufoje dum la monato kaj propagandas vian valoran monatan gazeton EPĈ.

Gratulon kaj sukceson deziras al vi sincerkore via fidela leganto.



# Internacia Revuo

## FRANCA FRANKO EN KRIZA POZICIO

Lastatempe pliprofundiĝas la serioza financa krizo en la kapitalisma mondo. En la monaj merkatoj de okcidenta Eŭropo kaj Usono foje kaj refoje leviĝis ŝtormoj de elvendado de francaj frankoj, sterlingaj pundoj kaj usonaj dolaroj kaj konkura aĉeto de oro kaj okcidentgermanaj markoj. En tiu financa krizo, la pozicio de la franca franko fariĝis ankoraŭ pli ŝanceliĝanta.

Ekzemple en la franka krizo en decembro de 1968, pro rapida falo de la kurzo de franko, la Banko de Francio ne povis ne forvendi kun dolora bedaŭro grandan kvanton da oro kaj fremdaj valutoj por aĉeti frankojn kaj teni ties pozicion. En nur iom pli ol unu semajno, la franca registaro jam perdis siajn oron kaj fremdajn valutojn kun valoro de ĉirkaŭ miliardo da usonaj dolaroj, kiu sumo egalas al kvarono de ĝia totala rezervo de oro kaj fremdaj valutoj.

## LA STERLINGA PUNDO EN DANĜERA MALSTABILECO

La financa krizo en la kapitalisma mondo puŝis la britan pundon, kiu estis devalutita antaŭ nur unu jaro, denove en danĝeran malstabilecon. En la kvar tagoj de la 15-a ĝis la 19-a de novembro, 1968, la Banko de Anglio devis uzi siajn fremdajn valutojn kun valoro de pli ol cent milionoj da sterlingaj pundoj por aĉeti britajn pundojn sed ĝi ankoraŭ ne sukcesis stabiligi la situacion.

Post la devaluto de la brita pundo, la financa kaj ekonomia stato de Britio, kaj precipe ĝia internacia en- kaj el-speza stato, kiu rekte influas la pozicion de la brita pundo, daŭre malboniĝas. La meznombra monata deficito en eksterlanda komerco de la unuaj sep monatoj de 1968 estis pli ol sepdek milionoj da pundoj. Sekve de la pliiĝo de deficito en eksterlanda komerco, la deficito de ĝiaj internaciaj en- kaj el-spezoj sole en la unua duonjaro jam atingis kvincent milionojn da pundoj kiu sumo estas proksima al tiu de la tuta jaro 1967. Samtempe kreskis ankaŭ ĝiaj ŝuldoj eksterlandaj. La plua seriozigo de la financa krizo certe kondukos la imperiismajn landojn al kaŝaj kaj malkaŝaj interbataloj, kiuj siavice certe pliprofundigos la kapitalisman financan krizon kaj akcelos la kolapsiĝon de la imperiisma sistemo. Tio ĉi estas "ensorĉita cirklo", el kiu imperiismo neniel povas sin liberigi.

## 20,000 ELEKTRAJ KAJ GASAJ LABORISTOJ STRIKAS EN NOVJORKO

En la lasta decembro, 20,000 elektraj kaj gasaj laboristoj de Novjorko komencis grandan strikon por postuli pliigon de salajroj. Tiu ĉi striko respegulis la flugan leviĝon de la prezoj kaj senĉesan malaltiĝon de la efektivaj salajroj de la usonaj laboristoj sekve de inflacio.

La reakciaj aŭtoritatoj de Usono ĉiamaniere klopodis subfosi tiun strikon, intrigante devigi 4,000 oficistojn labori anstataŭ la strikantaj laboristoj kaj utiligi reakciajn sindikatojn forvendi la interesojn de la laboristoj kaj malsukcesigi ilian strikan batalon, sed la novjorkaj elektraj kaj gasaj laboristoj persistas en sia batalo spite al la minacoj kaj trompoj.

## LA POPOLO EN KERALA DE HINDIO EKPRENIS ARMILOJN

Frumatene de la 24-a de novembro, 1968, pli ol 300 revoluciaj popolanoj en Pulpalli de Calicut de la hinda ŝtato Kerala ekprenis ponardojn, lancojn, memfaritajn pafilojn, eksplodaĵojn kaj aliajn armilojn, sieĝis la radiostacion de la reakcia polica aŭtoritato kaj mortigis kaj vundis ses reakciajn policanojn kaj policajn oficirojn. Kaj antaŭ tio, pli ol 400 keralaj revoluciaj popolanoj brave atakis la policejon de Tellicherry.

La 25-an de novembro, ĉirkaŭ 200 revoluciaj kamparanoj de Kerala atakis la bienon de granda bienulo en Kuttanad. Ili indigne frakasis la neston de tiu bienulo kaj konfiskis grenon kaj aliajn objektojn, kiujn li rabis de kamparanoj. La filo kaj lakeoj de la granda bienulo haste forfuĝis.

## HISPANAJ STUDENTOJ DISVOLVAS KONTRAŬFAŜISMAN BATALON

La batalo de hispanaj studentoj kontraŭ la faŝisma tiranado de la reĝimo de Franko kaj kontraŭ la putra kapitalisma eduka sistemo jam rapide disvolviĝis al la altaj lernejoj en diversaj lokoj de Hispanio.

La 6-an de decembro, 1968, ekstrikis pli ol 20,000 studentoj de la Madrida Universitato en la hispana ĉefurbo. Kvar el la sep ĉefaj fakultatoj de tiu universitato paraliziĝis pro la striko. La faŝista hispana aŭtoritato arogante deklaris fermon de la jura fakultato de tiu universitato por nedifinita periodo pro tio, ke ĝiaj studentoj aktive partoprenis la strikon kaj faris sidan manifestacion.

Ankaŭ en Barcelona, Valencia, Compostela, Bilbao kaj aliaj urboj eksplodis studentaj strikoj.

*Sur la kovrilo:*

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la laborista klaso de nia lando organizis laboristajn propagandajn taĉmentojn de la penso de Maŭ Zedong kaj ĉi tiuj torente marŝis en la lernejojn kaj ĉiujn aliajn sferojn de la superstrukturo por gvidi la plenumon de la tasko de batalo, kritiko kaj reformo.

Jen membroj de la ĉefurba laborista propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong laboranta en Kinghua-universitato intime interparolas kun revoluciaj instruistoj kaj lernantoj pri batalo, kritiko kaj reformo.

*Sur la dorskovrilo:*

La propaganda taĉmento de la penso de Maŭ Zedong de la Liberiga Armeo en marŝado

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO
P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 3 (128) 1969

## Ĉefa Enhavo

Lernejoj de Nova Tipo Elkulturas Novajn Homojn

Maljuna Malriĉkamparano Fondis Agronomian Mezlernejon

Kulturado de Daŭrigantoj de la Komunisma Afero

Malriĉkamparanoj kaj Malsuperaj Mezkamparanoj pri la Eduka Revolucio en la Kamparo

Feng Fuŝeng post la Suriro de Gvida Posteno

La Ruĝa Suno Brile Lumigas Profundan Montvalon

Verkoj de Maŭ Zedong Broŝure Eldonitaj en Esperanto

Krei Novajn Meritojn por la Popolo

Riĉa Rikolto el sub Hajlo

Viveca Leciono (*poemo*)

La Ora Ponto al Komunismo

Sendi Salon

Liu Ŝaŭki Estas la Ĉefkrimulo en Restarigo de Kapitalismo

Entombigi "Teorion pri Estingiĝo de Klasbatalo"

Oceana Ŝipo "Gao Yang" Estis Surakvigita

Bormaŝino por Profunda Naftoputo Sukcese Fabrikita en Ĉinio

Miraklo en la Medicina Historio

Ruĝa Signal-lanterno (*Pekina Opero*)

Nova Etoso en la Lando de Agloj

Sovetuniaj Laboristoj en Tragedio


# La Pagoda Monto de Jan-an

## Kingtian-a Ŝtonskulptaĵo

Ŝtongravura arto estas unu el la antikvaj metiartoj de nia lando. Plene utiligante la naturajn kolorojn de ŝtonoj oni artisme ellaboras el ili diversajn metiartaĵojn.

Kingtian, Venĝoŭ, Hangĝoŭ kaj aliaj lokoj de Ĝegiang-provinco estas la ĉefaj produktejoj de ŝtonskulptaĵoj de nia lando. Kingtian-a ŝtonskulptaĵo, kiu tiel nomiĝas laŭ sia produktejo, estas brile bela kaj kun bona kvalito kaj konvena moleco por skulptado.

En la granda proletara kultura revolucio, la revoluciaj artaj laborantoj de Kingtian kaj aliaj lokoj kreis multajn artaĵojn kun la enhavo de la proletara revolucio kiel subjektmaterialo por prikanti Prezidanton Maŭ, la Komunistan Partion de Ĉinio kaj revoluciajn heroojn. La Kingtian-a ŝtonskulptaĵo *Pagoda Monto de Jan-an*, prezentita en la bildo estas unu el la eminentaj verkoj multe ŝatataj de la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.






# La Pionira Higiena Sekcio Tutkore kaj Tutanime Servanta al la Popolo



Alte tenante la grandan ruĝan standardon de la penso de Maŭ Zedong kaj firme efektivigante la brilan instrukcion de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon"**, la higiena sekcio de iu el la pekinaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo direktis sian servadon al rotoj kaj amasoj, tutkore kaj tutanime servis al la popolo kaj atingis brilajn sukcesojn. Sub la konduko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ili rompis superstiĉojn, liberigis la penson, fariĝis kuraĝaj kaj kapablaj en revolucio, kaj en la 23-a de marto, 1968, sukcesis elpreni el la ventro de komunumanino Ĝang Kiugju tumoron 45 kg. pezan kaj kreis miraklon en la medicina historio de la mondo.

Por laŭdi ilian progresintajn penson kaj laboron, la Komisiono pri Militaj Aferoj de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio proklamis, sankciite persone de Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, dekreton honori la sekcion per la titolo "Pionira Higiena Sekcio Tutkore kaj Tutanime Servanta al la Popolo".



*Supre-maldekstre:*
Estas la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu donis al ŝi la duan vivon. Post resaniĝo, ŝi pli diligente kaj kreive studas kaj aplikas la penson de Maŭ Zedong kun profunda klasa sento de senlima amo al Prezidanto Maŭ.

*Malsupre-maldekstre:*
Por trovi konvenan laparatomian entranĉejon, la kamaradoj de la sekcio disvolvis la kolektivan saĝon kaj revolucian spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, ripetade studis per memfarita modelo serion da malfacilaj demandoj en tekniko, kia tiu de laparatomia entranĉejo.

*dekstre:*
Dank' al la ĉiamvenka penso de Maŭ Zedong, la kamaradoj de la higiena sekcio konkeris malfacilojn unun post alia kaj sukcesis elpreni el la ventro de Ĝang Kiugju tumoron 45 kg. pezan.




彻底批判資産阶級医疗卫生路綫
毛主席语录
凡是错误的思想·凡是毒草·
凡是牛鬼蛇神·都应该进行批判
·决不能让它们自由泛滥·



Kun klasa sento de senlima amo kaj senlima fidelo al Prezidanto Maŭ, Ĝang Kiugju (la tria de maldekstre) venis al la ekspozicio kaj kune kun aliaj emociite rigardas la 45 kg. pezan tumoron elprenitan el ŝia ventro. *(Supre-maldekstre)*

Nepre persistu en komando de la penso de Maŭ Zedong super ĉiuj laboroj. Ĉiuj kamaradoj de la higiena sekcio ripetade studas la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri higiena laboro, ĝisfunde kritikas la burĝaran linion en kuraca kaj higiena laboro praktikita de Liu Ŝaŭki, la granda renegato, granda interna spiono kaj granda laborist-perfidulo. *(Malsupre-maldekstre)*

Post la operacio, ŝi rapide resaniĝis kaj denove partoprenas laboron. *(dekstre)*

